

Sennacieca Revuo

Oficiala Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda

LITERATUR-SCIENCA ALDONO

Antaŭe "La Nova Epoko"

ENHAVO:

H. REMERS: Kiam mi estis azeno. — *DAMIANO BED-
NY:* Mastro kaj laboristo. Fablo. Trad. A. Jodko. —
H. ZUR MÜHLEN: Dimanĉa prediko. Trad. M. Diessler. —
E. MIĤALSKI: Ni estas ... Vers. — *L. SEJFULLINA:*
Aleksandro Macedona. Trad. Nikodem. — *N. PARGA-
ĈEVSKI:* La sonorado de l'koroj. Vers. — *M. MAKSUD:*
Mi vin ne laŭdas. Trad. Faik Baĥtejev. — *B. KAZIN:* Labor-
ista Majo. — *G. SANNIKOV:* Printempaĵo. Vers. Trad. N.
Nekrasov. — *P. BROODCOORENS:* La ruĝa sango de la
flandroj. Trad. L. Bergiers. — *M. STARR:* Nova Utopio
(Elĉerpitaĵoj el Wells). — *N. NEKRASOV:* Patri-ideo en la
nuna rusa poezio. — *M. KRIUKOV:* Homlingvo, Esperanto
kaj ilia evoluo. — *PROF. A. A. PETROVSKI:* Perspektivoj
de radiotekniko. Trad. D.ro A. Fiŝer, C. K.

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (Rusio)

Administracio: R. Lerchner, Colmstrasse 1, III., Leipzig-Stötteritz (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

Responde al nia voko pri esprimo de l' opinio rilate al la "Aldono" nemultaj kamaradoj sendis siajn *kritikojn* pri nia laboro. Kelkaj, kiuj konis "La Novan Epokon" antaŭan, eldiris tamen, ke mankas nun en la "Aldono" la fakoj: "Esperantista Movado" kaj "Kritiko-Bibliografio", ĝuste tiuj fakoj, kiuj estis farantaj la gazeton aktuala kaj vigla. Certe, ili estas pravaj, se ili traktus la „Aldonon“ kiel aparta publikaĵo, sed ili forgesas, ke "Senn. Revuo" kaj "Lit.-Sc.Aldono" estas *unu komuna afero*, neniel disŝireblaj unu de la alia kaj unu la alian kompletigantaj reciproke. Nur, kio mankas al "Senn. Revuo" en la rilato pure abstrakta, tion faras la "Aldono", kaj inverse — kio estas por nia speciale literatur-sciencia, fakeca "Aldono" tro pasanta, koncernanta la aktualan momenton, por tio estas loko en "Senn. Revuo" mem. Jen estas la esenco de la nova "Aldono", kiu diferencigas ĝin de "La nova epoko" antaŭa, kiam tiu estis gazeto memstara. Oni taksu do la "Aldonon" ne aparte, sed ĝuste kiel aldonon — entute kun "Senn. Revuo."

Ne estas forgesinde ankaŭ, ke en tiu malfacila komenca periodo nemultaj bonvolis kredi, ke "La nova Epoko" estas vivkapabla, eldonate en la lando materiale ruiniĝinta kaj, malgraŭ ke la ekonomiaj resursoj tiutempe ĉiam plu kreskis kaj ni havis ĉiujn perspektivojn por bone bazigi la eldonadon, oni estis sendantaj al ni nek daŭrajn abonojn, nek verkaĵojn. Pro tio "La nova Epoko" estis kombinata minimume je *tri kvaronoj* el la skribaĵoj de la redaktantaro mem — nur. Feliĉe lastatempe ni povas kontente konstati, ke nun estas inverse kaj la tuta enhavo de la „Aldono“ estas samkvante je tri kvaronoj verkaĵo sendata al la redakcio jam de la legantaro mem. Tiel do samkiel antaŭe la redakcio estis responda je tri kvaronoj pri ĝenerala intereseco de la enhavo, same nun je tri kvaronoj tiu enhavo kuŝu sur la konscienco de la kunlaborantoj — de ili dependas la tuta enhavo de nia "Aldono" — la redakcio nur ordigas la ricevaĵojn.

Unu riproĉo estas cetere sufiĉe trafa — la riproĉo pri ofta uzado de diversaj novaj vortoj, kiuj "ne estas laŭ la ortodoksa Fundamento". Pri tio oni eĉ kutimas diri: la lingvaĵo de "Senn. Revuo". Efektive okazas, ke kelkaj vortoj ne estas troveblaj en vortaroj kaj aliaj estas simple mallongigitaj ("ti-kiuj", "proleto" k. s.). Nu, pri la unua afero ni devas memori, ke nia "Aldono" estas tamen ja *sciencia* revuo, kvankam populara. Kaj ofte okazas, ke popularigi sciencaĵon signifas profanigi ĝin, dum iu "populara", verkita per „oficialaj“ radikoj artikolo nenion komunan kun scienco havas. En tiaj okazoj la redakcio ĉiam preferas uzi novajn specialajn vortojn anstataŭ agi kiel aliaj esp. gazetoj kun "sciencaj" rubrikoj, gvidataj terure analfabete en scienca senco — kvankam sen lingvaj "herezaĵoj".

Pri la alia afero ni povas diri, ke la mallongigo de longaj vortoj, kiel ekz. "situ(aci)o, evolu(ci)o, prolet(ari)o, specif(ik)a, aŭto(mobilo), (aŭto)buso", estas absoluta necesajo de nia rapidecon postulanta, progresanta epoko, kaj se tia mallongigita vorto ne estas konfuzebila kun la aliaj kaj estas facile divenebla, ĝi ne estas evitinda. Kiuj sin ŝarĝos per superflua balasto, tiuj ne sukcesos kuratingi la ekspres-lokomotivon de la historio. Aliparte, la simpla, komprenbla stilo prave estas nepre necesajo por nia proletaria revuo, ĉar ĝi estas ĝuste *proletaria*. Tial la redakcio intencas en proksimaj numeroj doni iom pli da simpla, facila legaĵo. Ni jam notis antaŭe la originalan rakonton de k.do *Senheredigito* ("La klaskonscia laboristinfano"). Ĝi estas ordinara simpla rakonto, senpretenda kaj senartifika. Al tia speco rilatas ankaŭ la etudo "Kiun"?, sendita de k.do *Bransburg*.

Bedaŭrinde hodiaŭ ni ne povas paroli pli multe pri la kuŝantaj en la redakcia paperujo manuskriptoj. Nur unu bonan konsilon ni volas esprimi al niaj kunlaborantoj:

— Ĉiam preferu sendi eble ne tro frapantan, sed originalan, *de vi mem verkitan* artikoleon, rakonteton, poemeton (pri la poezio ni parolas speciale), kaj — nur kiam iu de vi legata fragmento en nacilingva literaturo ŝajnas al vi esti eksterordinare interesa, tute nova, pripensiga, freŝidea, — faru tradukon. *La redakcio.*



KIAM MI ESTIS AZENO

H. REMERS

Antaŭ ol povi eniri la misteran Nirvana'on la animo devas trapasi plurajn ŝtupojn por sufiĉe puriĝi kaj indiĝi. Alpreni povas la animo ĉian formon, ĉu hundan, ĉu ratan, ĉu homan aŭ ian alian. La Karma decidis, ke ankaŭ mi iam, antaŭ multaj jaroj, vivis kiel azeno.

Kiel subulo de mia "sinjoro" mi estis ofte batata kaj devis ĉiam porti pezajn ŝarĝojn. Krom tio mi estis primokata de ĉiuj homoj, sed tiam mi ne sciis kial. Mirinde mi ĉiam emis aŭskulti interparolojn de homoj tiel ke mi kelkiam forgesis labori, kio al mi regule kaŭzis batojn per la bastonego de mia "sinjoro".. Do mi estis besto kaj sklavo destinita servi ĉiuforte al mia "sinjoro" kaj pro tio mi havis la solan rajton esti humila kaj obeema.

Kaj kiam mi volis defendi min provante ion diri, tiam mi nur sukcesis elbuŝigi raŭkan kaj abruptan blekadon, kiu laŭte sonis tra la stratoj. Tiuokaze la homoj ridadis kaj insultis pri mi, nomante min "malsaga azeno". Anstataŭ plibonigi miajn situacion kaj reputacion mi atingis la malon. Mi iĝis tiam iom obstina kaj malobeema kaj deziris la unuan fojon esti homo.

Plenigita manĝujo estis mia konsolo. Manĝante mi forgesis mian mizeron. Plena stomako mia kontentigis min ĉiam kaj mi eĉ forgesis mian suferadon, ĝis min pelis al laboro la ŝupinto de mia "sinjoro". Lutage li gvidis min en urbparton, kiun mi neniam estis antaŭe vidinta. En arboza larĝa strato mi haltis ĉe moderna granda magazeno. La domoj tie estis grandaj kaj havis belajn parkojn kaj ili estis ornamitaj je balkonoj kaj arkitekturajoj. Mi ĉiam devis loĝi en stalaĉo. Mia "sinjoro" iris en la magazeton. El ĝi penetris bonodoro, kian mi neniam antaŭe konis. Tra la vitroj mi vidis plej delikatajn bongustaĵojn de mi neniam viditajn. Multe da homoj ŝarĝitaj per ili venis el la magazeno kun okuloj, radiantaj pro plezuro, inter grasozaj vangoj. Ili preterpasis min kun fiere levitaj kapoj. Tenate de silkvestitaj patrinoj kelkiuj bubaĉoj rikane kaj sible nomis min "malsaga azeno". Kaj mi kondamnis mian sorton kaj duan fojon deziris esti homo.

Aliam min gvidis mia sinjoro al granda konstruaĵo nigra kaj malbela, kun fenestretoj kiel ĉe malliberejo. Mi paŝis en vastan korton.


Tie mi rigardis strangajn estaĵojn. Bestojn — samkiel mi estis besto. Sklavojn — samkiel mi estis sklavo. Ili portis surŝultre pezegajn ferobjektojn. Aliuj svingis grandajn martelojn kaj batis per ili gigantajn fermasojn fajroruĝajn, tiel ke fajreroj flugis ĉien. Fornoegojn mi vidis, kvazaŭ inferojn. En ili bolis kaj siblegis fajroarda fluaĵo. Staturoj kuris tien kaj reen. Malpuraj, nigraj kaj preskaŭ nudaj ili estis. La aero vibris kaj estis varmega kaj sufokiga. Estis terure. Mi staris paralizita. Apenaŭ povis mi spiri kaj preskaŭ svenis. Maldolĉa ŝaŭmo fluis el mia buŝo kaj ŝvito kovris mian korpon. Radegoj turniĝis kun laŭtega muĝado. Vaporo penetris kun bruegado el maŝinoj kaj aŭdiĝis tondrado kvazaŭ kanonoj pafadas. Ĉirkaŭ mi preterveturis strangaj kolosaj demonoj ŝprucantaj pluvon da fajreroj. Fulmrapide ili aperis antaŭ, apud kaj malantaŭ mi, kvazaŭ ili volis renversi kaj frakasi min.

La strangaj sklavoj silente kun sulkiĝintaj vangoj, en kiuj esprimiĝis malespero kaj rezigno, seninterrompe laboregadis kvazaŭ ili estis maŝinoj samkiel la aliaj maŝinoj ĉirkaŭ ili. Iliaj korpoj estis malsekaj je ŝvito. Mi bedaŭris tiujn bestojn kies sorto estis eĉ pli terura ol mia. Subite venis homo kun ĉapelo kaj blanka kolumo. Laŭte li ekparolis kun la sklavoj — bestoj. Li kriis kaj ŝajne li koleris, do subite li levis piedon kaj piedbatis iun sklavon en la postajon, tiel ke li falis teren kun ekkrio. La aliaj ankaŭ ekkriis kaj komencis paroli. Nun je mia miro mi ekkonis, ke tiuj sklavoj ne estas bestoj, sed ankaŭ homoj. Homoj — sklavoj. Ili mangestis kaj kliniĝis teren al la falinto. Kolere ili babilis, nomante la bapinton malaperintan "fikapitalisto".

Furioze ili insultis — insultadis kaj skuis la pugnojn. Poste ili denove eklaboris. Mia supozo plifirmiĝis, ke ili ne povis esti homoj, sed nur homoj-sklavoj, kvankam mi ne povis kompreni tion, ĉar mi ĉiam estis kredanta ke nur azenoj kaj aliaj bestoj povas esti sklavoj. Tiam mi dubis ĉu estas pli agrable esti homa sklavo aŭ besta sklavo. Al mi preskaŭ ŝajnis ekzisti du specoj da homoj kaj mi jam ne deziris esti homo, sed ĝojis esti azeno. .

— — — — —
— — — — —

Pasis multaj jaroj. Nun mi vivas kiel homo-sklavo. Rigardante ĉirkaŭ mi — ekdubas mi ĉu ni ĉiuj estas homoj aŭ azenoj.



MASTRO KAŜ LABORISTO

FABLO DE DAMIANO BEDNY

Al Jeremio-kampano,
La plej riĉega vilaĝano,
Okazis la malĝoj':
Dungiĝ' la devojn neis,
Dungiĝ' Tomas', bonul', por tiu foj'
Ne plu obeis,
Kaj kolerega ĝis sufoko de la spir'
Tomas' Jeremjon insultegis:
— "Ho, vampir'!
Sufiĉe trinkis vi la sangon mian, —
Plenumi por mizera pag'
Ne povas mi sen halt' dum nokt' kaj tag'
Laboron vian.
Se al vi mankas hont' aŭ en la kap' raci',
Do Dion timu, besto!
Rigardu, baldaŭ venos festo,
Sed ĉu ripozis iam mi ĉe vi?
Pro troŝarĝigo per laboro
Ne estis tempo por respir', —
Kaj jen al mi, jungita vir',
Dum tuta jar' preĝejon iri mankas horo!"

La mastro diris kun malbonhumoro:
— "Absurdon naskis via kap'!
En ĝi videble mankas klap'
De l' konscienco
Kaj senco!

Min rabi eble estas via nun intenco? ...
Kaj kiajn festojn vi elpensis, malsaĝul' ?
Komprenu do, se vi ne estas frenezul':
Malbona estas de l' festantoj vivofino...
Kiele, sentaŭgulo, min atakas vi:
— "Ne preĝas mi al Di'!" —
Eksciu do, Kaino,
Pri vi ia preĝos mastro kaj mastrino!"

El la rusa trad. A. JODKO

DIMANĈA PREDIKO

RAKONTO DE HERMYNIA ZUR MÜHLEN

La presata societudo apartenas al k.dino *Hermynia zur Mühlen*. Ĉar ne-multaj konas tiun nomon, ni petis al la tradukinto sendi por antaŭnoto kelkajn biografiajn informojn, kaj nia k.do sukcesis ricevi de la aŭtorino mem mal-longan vivskizon, verkitan speciale por nia Literatur-Scienca Aldono. Ĝin ni enmetas kun la espero, ke ĝi interesos nian legantaron.

Ja la vivovojo de k.dino *Hermynia zur Mühlen* estas tiu de multaj en nia epoko kaj tre karakteriza.

Du mondoj, du ideologioj, du vojoj: unuflanke diplomatoj, bienposedantoj, lukso, profiteco kaj maljusto. Aliflanke — laboristaro, malriĉo, solidareco, klaslukto, kaj fine — emancipo! Ŝi kuraĝis kaj scipovis elekti sian vojon. Jen ĝi estas en ŝiaj propraj vortoj:

Mia biografio estas tre malinteresa kaj sensignifa. Mi naskiĝis en jaro 1883 en Wien kiel filino de aŭstria diplomato. Poste mi travojaĝis multajn partojn de la mondo kaj edziniĝis en 1908 baltikan bienposedanton, de kiu mi ses jarojn poste disiĝis pro politika malharmonio. Ju pli mi travojaĝadis la mondon, precipe la baltikajn provincojn, des pli mi ekkonis la absurdecon kaj maljustecon de nia hodiaŭa socia sistemo.

En la jaro 1916 mi aliĝis al la svisa socialdemokrata partio kaj en 1921 al la nun malpermesata K. P.

Komprenoble mi nuligis ĉiujn antaŭajn familiajn kaj parencajn interrilatojn kaj nune mi nutras min per de miaj porliteraturaj laboroj.

Iun dimanĉon staris la pastro ĉe la predika pupitro, kaj voĉlegis el la evangelio. La preĝejo troviĝis en la kvartalo de l' malriĉuloj, kaj tiun-ĉi dimanĉon estis amasigita sub la ora kupolo tre multe da zorgoj, malriĉeco kaj suferoj, kaj la granda ejo apenaŭ sufiĉis por akcepti ilin. Laborstreĉitaj malgrasaj manoj interplektite por preĝo petegis en sia mizerego, melankoliaj okuloj al la ora kupolo, kvazaŭ ili atendus de tie helpon kaj savon.

Bonnutrita, kun ronda ventro, staris la pastro ĉe la pupitro kaj eksonigis oleecan voĉon:

"Benataj estu la humiluloj!"

Jen okazis io stranga: malantaŭ la diktrunka pastro ekaperis sensanga en ĉifonoj envolvita staturo. Osta mano flankenŝovis la nigrevestiton, kaj okupis lian lokon. El la pala vizaĝo d el' ĉifonulo rigardis du kolerplenaj okuloj en la navon, kaj potenca voĉo kriis:

"Malbenataj estu la humiluloj, ĉar ili pekas kontraŭ la amo!"

Rigidaj pro mirego ili rigardis la pupitron . . . kaj la ĉifoniton; kaj la ĉifonulo ekkomencis prediki:

"Malbenataj estu vi malhavuloj kaj mizeruloj, kiuj en ĉi-tiu preĝejo estas preĝantaj, ĉar via pacienco kaj humileco kaŭzas malriĉecon kaj mizeregon!"

"Malbenata estu via pacienco, ĉar ĝi mortigas viajn infanojn."

"Malbenata estu via, la ĉielon sopiranta, la teron forgesanta, pieco, ĉar ĝi estas la armilo, kiun vi mem al la malamikoj donas en la manon. Vi estas pli malbonaj ol la bestoj, ĉar se besto vidas


sian idon malsati, tiam ĝi akirigas al si nutraĵon, eĉ se ĝi devus mortigi.“

“Vi malŝparemuloj! Vi malŝparemuloj!“

“Via humilo malŝparas homajn vivojn, kvazaŭ ili estas herbtigoj!“

“Vi jesantoj de malbona mondordo!“

“Ĉiufoje, kiam vi diras: Jes! je la krimoj de l' riĉuloj, vi mortigas sennombrajn malriĉulojn, vivantajn kaj ne naskotajn.“



“Tuta mondo estis donata al vi, la mondo plenplena da feliĉigaĵoj por vi kaj viaj infanoj. Vi lasis ilin al la banditoj, rabistoj kaj murdistoj por ke ili abunde diboĉu, dum vi pereas pro mizerego. Malbenataj estu viaj por preĝo interplektitaj manoj, ĉar ili estas donataj al vi por elbatali vian rajton.“

“Malbenataj estu viaj pezaj langoj, kiuj nur scias plendi, kaj ne scipovas postuladi.“

“Malbenataj estu viaj inertaj koroj, kiuj ne estas ekflamiĝintaj de l' justeco!“

Tremis en la navo la koroj de kredemularo sub ĉi-tiu terurega akuzo. Virina voĉo ekkriis: ... “Ĉu vi nur kapablas malbeni? Ĉu vi ne povas beni?“

Jen rigardis la malhelaj okuloj ampleneze al la homoj, kaj la potenca voĉo parolis:

"Benata estu la sankta kolero, kiu kiel ruĝe ardanta flamo nevenkebla, forbruligas la malbonan mondordon je cindro... Benata estu la sankta malamo kontraŭ la malbono, ĉar ĝi preparas la vojon por la bono.

"Benataj estu viaj manoj, kiam ili ekprenas la armilojn por elbatali vian rajton... Benata estu via lango, se ĝi ripetas viajn justajn postulojn tage kaj nokte, ĝis la mondo estos plenigita de via krio... Benata estu via koro, se ĝi superfluas de amo por fratoj en mizerego, kaj nenian kompaton konas por la senkompatemuloj. Benataj vi estu, se vi harmoniadas, ĉar tiam via estas la potenco. Benataj vi estu, se vi al la banditoj, rabistoj kaj murdistoj forprenas la mondon, por ke ĝi apartenu al ti-kiuj laboras. Benata estu la sankta sango elverŝita dum batalado pro la justeco."

"Benata estu la ago." La ĉifonulo benante levis la manojn: "Benata vi estu popolo, amaso, proletariaro, ĉar via estas la estonteco, la nova mondo, la regno de l' justeco."

Elgermanigis *Max Diebler (Breslau)*.

Ni estas ...

E. MIHALSKI

*Ni estas ribelantoj ... En unu mano — glavon,
en dua — flagran torĉon — tra l' mondo iras ni.
Al kapital' pereon ni portas, kaj la savon
ni donas al jugita ĝis nun proletari'.*

*Ekbrulis nova suno. Radioj de libero
trafranĉas la tavolon densegan de nebul'.
Kaj falas rustiĝintaj perdegoj de karcero
kaj ŝanceliĝas tronoj de burĝo kaj kronul'.*

*Ondeg' de nova sento renversas ĉian baron.
Libere spiras brusto de laboranta hom',
kaj vane nigraj fortoj kontraŭas bruon maron,
iam malaperis ili, simile al fantom'.*

*Ho brulu, nia torĉo! Kaj senhezita hako
falegu sur rampantan viperon de rezist'.
Ne helpos kapitalon fidela ĝia drako —
— ulcero religia, pastraĉo — metiist'.*

*Eŭropo jam brulegas. Kaj jam revolucie
ruĝegas la standardoj en okcidento jen
kaj "La Internacio" libere sonas tie, —
la proletariato vekigas el katen'.*

*Nebulo jam disiĝas. Kaj ruĝon de aŭroro
solene kaj majeste elsendas orient'.
Suriras nova suno, helsuno de Laboro,
sur pura kaj sennuba, lazura firmament'. Saratov, 1919.*

ALEKSANDRO MACEDONA

Skiza novelo

5) L. SEJFULLINA (Daŭrigo)

VI

En la urbo unu straton, kiam oni nove estis retitolanta, oni nomis: strato de Elizabeto Macedona.

En la afero ŝi estis kaptita. Mortturmentis ŝin la blankuloj en malliberejo.

La plej juna Macedona, Demetriĉjo, antaŭ siaj kamaradoj fieris:
— Al nia Elinjo tutan straton oni donis.

Sed al la patro ankoraŭ unu profundan sulkon sur la frunton la malfeliĉo enigis.

Pli malhelaj, pli maljunaj pro la sopiro la okuloj. La vidkapablo malfortiĝi komencis. Pli ofte li estis enpensiganta. Persiste, porlonge. Kvazaŭ precizan kaj severan kalkuladon enpense li faris. Tiomomente li ne aŭdis, kion oni parolis ĉirkaŭe. Rekonsciiginte li al la maldekstra orelo la manon estis almetanta. Streĉite en vizaĝojn li rigardis. Kvazaŭ la aŭdkapablon li kontrolis kaj streĉis. Ĉe la bieno de Ŝidlovski oni lin Eŭdokimyjĉ komencis nomi. En interparoloj pri li oni simpatian al li esprimadis.

— Surdiĝas li, cedas. Ja sen tio li estis neaŭdebla, kaj nun kvazaŭ li tute ne ekzistas.

En sia afero li ne estis cedanta, sed en interparoloj efektive, li forestis. Pro laŭta parolo li eĉ estis iel konsterniganta. En la urbo oni pli ofte pri li rememoris: la patro de Elizabenjo Macedona. Sed ĝoja li estis, kiam oni en la urbon li ne vokis. Ĉe la bieno ĉiam li klopodis. Ordonon en la ĵurnalo aperis: rekvizi librojn ĉe privatuloj. Por aranĝi en la urbo grandegan, eksterordinaran publikan bibliotekon. Preskaŭ en ĉiu ĵurnalnumero oni skribis — libro estas por ĉiuj. Elizabenjon pli akre li rememoris. Kiel ŝi estis super la libroj... E-eh, ne ĝisvivis la filinjo!...

Ĉe la bieno, en la sinjora domo, ses ŝrankoj da libroj post forveturo de l'posedantoj estis lasitaj. Kune kun aliaj objektoj en la tagoj de tumulto oni disŝtelis multajn librojn. Macedona longe estis vizitanta loĝejojn kaj kolektis la librojn malbrue sed persiste. En la ĉefdomo — estinta sinjora loĝejo — unu ĉambron ĉe uzinanoj li elpetis. Kaj tutajn horojn li sidadis tie: deskuadis polvon de sur la libroj, forigadis malpuraĵojn de sur la bindaĵoj, algluadis paĝojn, la samamplekse egalajn kunmetadis, la titolojn registradis. Laboristoj iom mokridis:

— Ĉiam super la libroj? Atentu, ne freneziĝu pro ili en la maljuneco!

La senbruan ĉambron viziti ili ŝatis. Por ripozi de tabakfumo, hule pendanta en la aliaj ĉambroj. Por pri la defendo de l'urbo rememori. Por revokadon al la tagoj maltrankvilaj kaj ĝojaj fari. Macedona plejparte estis aŭskultanta kaj ridetanta.

Sed iatempe la interparoloj estis vigligantaj. Ankaŭ li vigligadis. Kiel militkaptitojn en la urbon li estis kondukanta — li rakontadis, kaj kiel en la kafejo al Kolĉak'a lakeo vizaĝon li batis. La laboristoj pacience estis aŭskultantaj la rakontojn jam aŭditajn. Senkolere ili spiritis pri li:

— Vi, verŝajne, sur tabureton estis stariĝinta por lian vizaĝaĉon atingi? Ĉu do, vi diras, fortika li estis?

— Kaj ĉu genuoj ne tremis, kiam vi estis kondukanta? Se iu vin per kubuto tuŝetus, for de sur la ĉevalo vi estus! Ja korpajo via ne estas forta!

Macedona ne ofendiĝis. Li sciis, ke oni fidas al li. En ĉiujn kontrolkomisionojn li estis konstante elektata.

Ĉe la granda regiona kunveno laboristo Dolohin, malserena kaj kolera maljunulo, tanisto el najbara leduzino, dum parolado unufoje diris:

— Nur sola ekzistas, al kiu mi fidus, jen al tiu mizeraspektulo el Ŝidlovski'anoj, al Macedona!... Laborema kaj la konsciecon li gardas! Kvankam kiel oficisto li elŝoviĝis el laboristo, sed mi simple diru: per unun vorto la homo — proletarioj el ĉiuj landoj. Lin vi elektu!

Longe poste multaj lin incitmokis: "proletarioj el ĉiuj landoj!" Sed oni amis lin. Kiel povas ami la homoj, ne malŝargintaj la plenecon de anima rilato per delikataj nenecesaj vortoj. Ili parolis krude, sed gardis ageme. Pri Elizabenjo oni malofte ĉe la uzino parolis. Ja la aferon, kiun ŝi komencis, ŝi plenumis. Ĝuste tiel decas. Kaj la maljunulo dume vivetas. Tiu ĉi estas bezona.

— Diru do al Eŭdokimyĉ, se io estas bezona el la urbo, mi venigos.

— He, maljunulo! Racionon mi alportis por vi. Sidu do super la libroj, via moŝto!! Nu, nu, ne gravas! Via dorso malrezista estas, kaj la mia fortikas.

Nur la instruisto kontraŭ lia malbruemo kelkiam estis indignantanta:

— Vivas vi, Aleksando Eŭdokimoviĉ, dum brua tempo. Dum la revolucia, sed ĉiam vi malbrua, glatita, milda estas. Nu, ni imagu, okazas jenajo: kvin homojn necesas mortigi, aliel ĉio renversiĝos! Nu, kiel vi? Ĉu vi kuntiriĝos, kiel pasero, kaj ĉio renversiĝu?

Ekpalpebrumis la okulojn Macedona, sed pli obtuze kaj pli firme, ol ĉiam, rediris:

— Babilaĉi pri tio ne decas. Fanfaroni — tio vana estas! Ankaŭ por mi afero troviĝos...

— Nu, sed tamen? Nu, tamen?

— Do jen, se necese estos, pro nia afero ankaŭ vin mi mortigos. Kaj mi ne bedaŭros. Se al tia ago ni venas, do sen retiriĝo. Sed per la lango tion kaj alion — ne decas! Ĉesi bonvolu.

Eĉ la rigardo pli firma fariĝis. Post tio interparolojn kun la instruisto li estis evitanta.

Ne bone estas tiamaniere animon turmenti: kion kaj kiel. Kion vi komencis, tion plenumu ĝisfine.

Kiam por anstataŭi Revolucionan Komitaton oni estis elektanta distriktan Ekzekutivan Komitaton de Sovetoj, Aleksandron Macedonan al ĝi oni elektis. Dum tri noktoj dormo for de la okuloj kuris.

Li graketis, tuisis, dubis:

— Kien mi? Klero mia, oni povas simple diri, estas kopekvalora. Lerteco malvigla... E-eh!

Kaj en la ĵurnalo presite estas: "*Gvidanto de l'urb-distrikta popolkleriga ĵako — k.do Aleksandro Eŭdokimoviĉ Macedona, el la uzinoj eks-Ŝidlovski.*"

Eĉ la patronomon oni ne konfuzis. Li penis rezigni, sed oni varme estis konvinkanta:

— Ne estas eble! Proletaria okulo necesas. Ja vi — partiano estas.

Iu kamarado tutan paroladon faris pri laborista kontrolo, pri la partio. Eĉ forgesis li, ke pri Macedona li komencis. Kaj ĉe Macedona la vizaĝo makuliĝis. Kaj en la animo nebuliĝis. Neniam li estis trompanta. En la raporto pri ĉiuj vivaj agoj kuraĝe li povus skribi — mi plenumis. Kaj nun? Ne laŭ la fortoj. Instruitajn homojn li timis.

Kion vi komencis, tion plenumu ĝisfine. Se necesas, kial do paroli? Iom graketis vi — kaj sufiĉas. En la urbon, en ĉambreton ĉe urbekstremo li transloĝiĝis.

Per la flamo de l'tagoj varmegaj forlekita estas graso de sur la urbo. En ĉiu loĝejo, en ĉiu angulo per propraj zorgoj, mankoj, rifuzoj kaj vundoj presita estas la kruela vorto: la revolucio.

Malgrasiĝis butikoj de viandistoj. Malpli pezaj fariĝis ĉaroj kun tritiko kaj pano. Estas kalkulitaj en forno lignoŝtipoj. Lace, per malsana, malvigla paŝado sin trenis sur fervojoj nehejtataj vagonaroj. Sur ŝoseoj, vojoj kaj stratoj estis falantaj ĉevaloj, ne povintaj tiri eĉ malplipeziĝintan ŝarĝon. Ĉiutage estis satiĝanta nur la sola nesribita, sed ĉiutage de homoj legata libro — registro de proksimuloj, elspeze prenitaj de la vivo. En oficejoj apud multekostaj, lukse ŝtofitaj brakseĝoj honteme kurbiĝis tripedaj taburetetoj. Sur belegajn skribtablojn oni estis metanta glandan kafon en argilaj kruĉoj kun forrompitaj teniloj, kun difektita glazuraĵo.

Kun ĉiu tago pli malplenaj fariĝas domoj, kofroj, tenejoj. Pli griza kaj ridinta la vestaĵo sur homoj. Kaj kun ĉiu tago pli laŭtaj, pli malkvietaj la voĉoj. Pli vastaj la planoj, pli ampleksaj la projektkalkuloj, pli arogaj la ordonoj. Kaj eĉ la malbrua Aleksandro Macedona ne havas timon aŭskulti dum kunsidoj de la kolegio la proponojn:

— Organizi en la distrikto reton da moveblaj bibliotekoj — legejoj en la kvanto da sescent. Adapti por ili aŭtomobilojn. Akcepti por postenoj de administrantoj de l' moveblaj bibliotekoj nur personojn, laŭeble, kun supera klero.

Legi en projektkalkuloj de la lerneja subfako:

— En la distrikto estu 250 lernejoj. Por ĉiu lernejo necesas akiri po mikroskopo. En la regionajn estas dezirinde doni teleskopojn.

Ekflugo de l' arogaj deziroj enkaptis ankaŭ lin, la malarogan. Administrantino de l' urba centra publika biblioteko petis:

— Almenaŭ duonklafton da ligno! En peltoj eĉ ni frostas. Krome, vidu, tri ĉaroj da libroj ĝis nun ne estas kontrolitaj. Tempo ne sufiĉas. La helpantoj estas malmulte alfabetaj. Eble vi povas iun ajn doni? ...

Kaj li, lumante per senlaŭta rideto, tube metinte la manon al la maldekstra orelo, parolis:

— Hieraŭ dum la kolegikunsido ni decidis: en la infanfako de l' biblioteko estu tiaj apartaj ŝrankoj. Ĉu vi scias? Kaj ankaŭ komforte estu. Morgaŭ ĉambroflorojn el la domo de komercisto Zajcev oni alveturigis. Necesas ke gvidu sperta persono!

— Sed la lignon ...

— Lignon.. la lignon? Tuj mi vokos administranton de l' provizuma subfako. Atendu minuteton! Tuj mi...

Kaj li estis revenanta konsternite.

— Dekdu ŝtipojn tuj oni per glitveturiletoj venigos al vi. Vidu, mi dimanĉe por mia loĝejo en la apudbiena arbaro la lignon hakos. Iel ajn, vidu...

Kaj li estis estingiĝanta. Precipe, kiam oni estis venanta kun postuloj pri salajro. Oni rigardis per pikantaj, malamantaj okuloj.

Oni parolis lerte, glate. Oni sciis, kiamaniere piki. Kaj li estis kun-tiriĝanta en buleton. Senhelpe li etendis la brakojn. Li komprenis: ili pravas. Necesas. Sed kiamaniere? Kaj timigajn vortojn por pruvi ke pravas ankaŭ ili, tie-ĉi sidantoj, li ne sciis. En la popolkleriga fako oni lin ne ŝatis. La maŝinskribistino Sonjo mokridis:

— El post angulo per sako batita!

Sekretario de la kolegio duonkaŝe ridetis:

— La subskribo fama, sed mem li: vi ternu pli laŭte kaj li disŝutiĝos!

Kancelariistino lerte imitis, kiel li dokumentojn legas: per la fingroj liniojn sekvas, movas la lipojn, la okulojn palpebrumas.

— Ne, vi aŭskultu, vi aŭskultu! Iufoje rezolucion li estis skribanta... Jen amuzo! Li skribas: "kankstrukcio"¹⁾.

— Jes, "kankstrukcio" de l' pensaparato ĉe li malfortas!

Administrantino de libroponejo rakontis:

— Jen kian oni trovis! Efektive! Venis li unuafoje en la deponejon: la paltaĉon evidente la edzino por li el malnovaĵoj kudris. La kolo per virina lanuga tuko estas volvita. Li iom tuis, ĝenis: "Ĉu vi donos eble muziknotojn por provizora uzo. Mia Manjo pianludi lernas". Kaj ĉu mi sciis, ke tio estas la gvidanto? Eĉ supozi mi ne povis! Mi diras: Kamarado, al ĉiuj Manjoj muziknotojn ni ne povas doni. Por la havaĵo ŝtata mi estas respondeca! Foriris li. Poste kun skribaĵeto de administranto de eksterlerneja subfako li venis. Mi tralegis, kiun mi estis forpelinta — la rido min preskaŭ plensufokis! Nu, jen kastoro!

— Sed partiano!

— Sed ja popolkle-e-rigan fakon li gvidas!

— Nu, li nur ĉeestas. Ja, la kolegio!

— Kaj en la kolegio plejparte senpartiuoj estas! Kaj ili jen laboras. Sed ili fanfaronas: ĉie partianoj! Sed komence ili la partion kolektu!

Nur unufoje defendi lin komencis delegitino de virinofako, en la antaŭlernejan subfakon delegita:

— Kaj vi, instruituloj, devus montri! Ĉiam vi mokas! Kraĉi sur vin mi intencas! Ne deziras mi tie ĉi!

Kaj ŝi forkuris peti transdelegon al sangarda fako.

La kolegianoj parolis kun Aleksandro Macedona edife-afable. Kvazaŭ kun infano.

— Kamarado Macedona, jen tie ĉi via subskribo estas bezonata. Tiu demando estas pridetala. Aŭskulti ĝin por vi estos lacige, kaj ni jam tie ĉi subskribis. Sekve ni garantias la neceson.

1) Konstrukcio — fremdlingva vorto por la ruso; ordinare tiaj vortoj estas fuŝe prononcataj de homoj malmulte instruitaj.

— Kamarado Macedona, morgaŭ vi devos ĉeesti malfermon de klubo ĉe Bogaĉeva muelejo. Vi tie, nu, mallongan tian salutvorton diru. Kaj por la paroladon fari ni iun ajn komisios kune kun vi.

— Sed vi ne maltrankvili-iĝu! La elspezraporton nia librotenado kontrolis. Nu, ĉu necesas rekontroli! Nia librotenado bonordas!

La rilaton de oficistoj al si li konis. Sed li estis trapasanta en sian kabineton sen ŝanĝi la nerapidan paŝmanieron. Kaj sub ies mokanta rigardo dokumentojn li ne estis ĵenanta. Ĉiam malrapidece, kun streĉo, dufoje li tralegadis. Nur tiam li estis subskribanta. En la granda, severaspekta konstruaĵo, inter la dikaj paperujoj kun dokumentoj, inter la ŝrankoj kun specialaj libroj, meze de la instruituloj ĉiam en siaj konoj certigitaj, li sopiris, kiel garantiulo. Pro ti-kiuj ĉe la bieno restis. Sed sola li estis travivanta sian tragedion. Al neniu li plendis. Kion li povis kaj sciis, tion li estis faranta.

Revigliĝanta li estis nur kiam malpleniĝas la fako. Estis forirantaj la oficistoj. Tiam, du-trifoje timeme ĉirkaŭrigardinte, li telefonis al la bieno:

— Peĉjo, ĉu estas vi? Nu, kio estas ĉe vi? La racionon? Mi ne scias. La panjo petis? Do morgaŭ mi ricevos.

Sed li estis ricevanta post ĉiuj. Kaj ĉiam nur post ti-kiam estis venanta la edzino por insulti. Multe pli maljuna, sed pli kruda kaj kuraĝa ŝi fariĝis.

— Kia vi estas estro? La infanoj en ĉifonoj, pano baldaŭ formanĝota. La filinon igis vi morti... Almenaŭ nutraĵon oni devus doni. Eĉ mem ni baldaŭ pro malsato mortos.

Iufoje li ekkoleris. Estis jam dirinta:

— Mi ŝin ne estis vendanta, la filinon!

Sed rigardis li en la kolerajn okulojn de l'edzino kaj ekvidis: pro malfeliĉo la koron rustaĵo suĉas. Humiliĝis li:

— Morgaŭ mi ricevos.

Li ricevis. Eĉ en gubernian provizkomitaton li veturis, katunon tie elpetis. Nokte longe li estis turniĝanta kaj ekspiranta.

Petis li, ke oni liberigu lin. Severa partia kamarado fortranĉis:

— Ĉu vi komunisto estas? Hontu malkuraĝi! Ĉiu el ni nun devas firme ĉe la posteno stari.

Kaj okaze veninta al distrikta partikomitato instruistino el la bieno de Ŝidlovski — Leontjeva, ediftone diris:

— Venis tempo, ke vi firmecon akiru, kamarado Macedona. Ni, komunistoj, ne povas esti senvolaj.

En la partion Leontjeva antaŭ monato, dum partisemajno, eniris kaj pri la rajtoj de partiano tre fieris.

Eĉ al siaj du kunulinoj, samkiel ŝi — edzinoj de blankaj oficiroj, fugintaj kun siaj regimentoj, ŝi diris:

— Nun por mi ne estas oportune daŭrigi konatecon kun vi. Mia memkonscio ŝanĝiĝis.

Macedona nenion al ŝi respondis, sed la malbrujaj okuloj pli severaj fariĝis. Kaj hejme humiligis li sin:

— Ankaŭ tiaj estas bezonaj. Instruita, ŝi helpos.

Sed malmulte tiaj estis helpantaj. Dummomente — sinceraj kaj prikalkulemaj. Sed por la penado komencita ĉiam ne plensufiĉas la taŭguloj. Jen Macedonan neniu anstataŭi povas. Kaj la tempo severa estas. La konfido nur — al la partibiletuloj. Ha, ligi vin kun ni vi timas? Ĉu prikalkulas, mezuras vi? Flankenigu! Malbona, sed sia homo. Tiamaniere do daŭris la turmentoj de Aleksandro Macedona en la popolkleriga fako.

Vigliĝanta per rideto ekfloranta li estis nur dumsabate. Ĝis lundo en la bienon. Al la familio. Tie, surmetinte edzinan varman bluzon, li hakadis lignon, alportadis akvon, en la biblioteko de li kolektita klopodadis, rakontojn de l' infanoj siaj aŭskultadis. Kaj tiuj ĉi viglaj kreskis. Peĉjo dum kunvenoj de junulara ligo paroladojn faras. Nun iun instruiston ĉe la bieno li trovis. Lingvon internacian lernas ĉe li. Varme al la patro li klarigis:

— Vidu, per tiu lingvo kun ĉiuj eksterlandoj oni povas korespondi! Rondeton ni havas. Kiam ni iom scios, al eksterlandaj proletarioj leterojn ni sendos.

Sed tago post tago ankaŭ al la popolkleriga fako li estis kutimiĝanta. La bieno tion helpis. La infanoj dumdimanĉe plivigliĝadis. Post la vizitoj pli gaja la voĉo. Li lernis ankaŭ helpi. Nerapidece kaj nekrieme al la kolegio li estis raportanta:

— Rimedojn por la kursoj jene ni povus trovi...

Kaj estis ĝuste. Nur ĉiam okazis iel, ke oni estis forgesanta, kiu la necesan solvon trovis. Por la trafa solvo ne Macedonan, sin mem la kolegianoj laŭdis. Sed tion ĉi ankaŭ li mem ne estis rimarkanta.

Kutima li iĝis ankaŭ al la oficistoj. Malpli oni ridis pri li. Pli kuraĝa li fariĝis. Dum la gubernia kunveno de fakgvidantoj ĉiujn li mirigis. Pri kulturklerigaj rondetoj oni estis parolanta. Macedona la vorton petis. Pli mallauĉe fariĝis en la halo. Ordinare tiu ĉi grizulo sidis, la mano tube ĉe la orelo, kaj silentis. Kion diros li?

— Kamaradoj, mi koncerne la rimedojn! Tio estas, la asignojn tiel diri! Francan lingvon aŭ jen la germanan, aŭ la anglan ankaŭ... Tio ĉi ne estas necesa! Sed ĉar ni deziras Internacion, do nepre laŭ la esenco estas bezonata la lingvo "eksperanto"¹⁾. Ĉiuj popoloj

(1) Tre ofta fuŝprononcado de la vorto en Rusio.

povas tiun lingvon paroli. Neprege mi proponus la lingvon "eksperanto!" Kaj rimedojn por tiuj ĉi rondetoj ni asignu.

Tuje kaj viglege estiĝis rido. La mokema baseto de l'gvidanto de la gubernia fako tute neniĝis Macedonan:

— Mi al vi, kamaradoj, sen rondetoj esperanton lernigos: *ĉevalimus falimus sur pontimus*.

Oni estis ridinta kaj al la vicaj aferoj transiris. La mokojn pro ĉagreniĝo li eĉ ne rimarkis. Sabate al la filo konfuzite li klarigis:

— Malsukcesigis oni min kun vi, Peĉjo.

(Finota)

El la rusa kun permeso de l'aŭtorino tradukis *Nikodem*.



La sonorado de l'koroj

N. PARGAĈEVSKI

*Sonas laŭte sonoriloj, sonas laŭte per la langoj,
Per la langoj sonas laŭte kvazaŭ rompa uragan';
Ili krias pri ribelo, ili tondras pri detruo,
Pri detruo ili tondras, pri ekstaro de l'titan'...*

*Ili estas mem titanoj kaj sonantaj uraganoj,
Kaj iliaj vokogamoj portas timon al regant',
Kaj la vok' tremigas teron, maron, montojn kaj sunsferon,
Kaj promesas la liberon al la homo-suferant'...*

*Ne, — sonoras niaj koroj, sed ne kupraj sonoriloj,
Ne metalaj sonoriloj muĝas kvazaŭ neĝovent'. —
Niaj koroj sonas kante, ribelante, pacigante,
Sed neniam humilante, eĉ por sola nur moment'.*

*Niaj koroj senkvietaj, postulantaj, sed ne petaj,
Postulantaj, sed ne petaj, vokas laŭte al la hom':
Eldormiĝu fine sklavo, ekradiu cia glavo,
Meze de l'nomar' herooa enviciĝu cia nom'!*

*Ja ne vane propramane ci konstruis kazematojn,
Ci konstruis kazematojn, faris ĉenojn por ci mem...
Venis la epok' detrua, ribelanta-rekonstrua:
Detruanta kazematojn, ĝojkreanta liberem'.*

*Kolektiĝu do, fieraj, sentoleraj, sinoferaj,
Konstruantoj de la vivo, laborantoj de la mond',
Kaj detruu senkompate, fulmofajre, tondrobate, —
Estu vi la plej minaca frakasanta naŭa ond'!*

*Kreis vi — kaj vi detruu, kion faris vi nevole,
Kion faris vi nevole dum la jaroj de l' sklavec'.
Detruinte — vivkonstruu, sed memoru saĝobole,
Ke ne restu de la premo eĉ malgranda rompopec'!*

*Tiam flirtos viaj flagoj... Tiam venos novaj tagoj.
Novaj tagoj de feliĉo, kiujn kreos la idar'...
Tiam ĉesos sangmilitoj, konkerantaj, porprofitaj, —
Por ide' la hom' batalos nur per pensa armilar'...*

*Do, heroe ni ekagu: por la venk' la sangon pagu, —
Por la ĝoja estonteco, eble, post la bataleg'
Batalintoj ni ekvidos tion, kion ni avidas:
Partoprenos ni la ĝojon de l' homara lumfesteg'.*



MI VIN NE LAŬDAS

M. M A K S U D

Vi ne koleru.

Pri vi oni skribis dum miljaroj. Kaj nun oni skribas. "Vi" oni diras. Oni diras, ke vi revivigas la mortintajn korpojn.

Vi, vi... Ĉio estas vi!

Kaj mi pri vi skribos.

Sed ne pri tiuj, kiuj deziras fari la mondon paca kaj feliĉa per viaj sorĉantaj ridetoj. Pri ili jam sufiĉas!

Dum la granda batalo inter du grandaj klasoj kaj dum la homaro enmarŝas novan vivon — ne povas esti tiaj skribaĵoj. Tio estas afero de la senfortuloj.

La afero de tiuj homoj, kiuj vidinte multajn malbonfarojn ne povas montri ilin kaj ne havas fortojn kontraŭstari ilin — tiuj estas la senfortuloj.

Ne sukcesante trovi alian vojon, oni trovadis feliĉajn bonagojn inter viaj rigardoj, ridetoj ktp.

Kaj oni sentis sin tiel feliĉe vive en la mondo!
La infanoj, tial silentis.
La pensintaj, ke ili estas fortikaj, la pensintaj, ke ili estas "grandaj homoj" kaj trovis "sanktan amon" — ili estis nur infanoj.
Oni vin kredigis. Kaj vi kredis. Vi opiniis vin esti feliĉuloj, ĉar vi donacis al la dezirantaj homoj feliĉon.
Kvankam vi ne donis al ili feliĉon, vi multajn senfortulojn mortigis.
La afero estas pri pasintaj tempoj.
Dume mi pri ili silentos.
Al la malnovaj temoj oni donas novan aspekton.
Ĝi ne estas via preparado kaj neatendado je bonaj donacoj. Ne.
Mi estas batalanto.
Mi ŝatas la batalon. Mi laŭdas la batalon.
Se mi kantas, mi kantas nur la poezion de la batalo.
Grandaj scienculoj de l'naturu diras, ke la vivo estas nur batalo — movado.
Mi ne estas scienculo, sed mi komprenas tiun leĝon, ĉar mi estas batalanto. Mi trinkis dolĉaĵojn de la batalo.
Jes. Pli frue dirinte, ke mi skribos pri vi, mi mensogetis al vi.
Ne pri vi mi skribos, sed pri kelkaj metodoj de la granda batalo, kiu prenis kun si kelkajn el vi.

* * *

Dum la pasintaj jaroj, kiam mi batalis kontraŭ la blankmanuloj kaj la kontraŭrevoluciuloj, kiam ili militiris kontraŭ la "sovetoj", tiam mi estis ruĝarmeano. Tiam kun mi estis unu amiko —! mia ruĝa pafilo. Ni estis kunigitaj ĉie. Kaj ni ambaŭ batis la blankulojn.
Ni estis en la montaro de Uralo.
Mi tie marŝadis.
Tie mi dum tuta somero ricevis nur solan leteron el la hejmo. Estis ĝojege por mi. Ricevinte mi deziris esti hejme kaj scii, kion oni faras tie, kaj ekscii pri la junulara vivo. Kaj mi ne eltenis...
Estis varmega julia tago... Marŝante inter ŝtonaj rokoj dum semajnoj, monatoj, miaj piedoj doloris, kaj mi — sub pafado de la blankuloj — en nia tranĉeo komencis legi sincere la leteron. La letero min tre fortikigis.
De kiu ĝi estis?
De unu fraŭlino.
Vi diras: "Vidu, kia li estas — li ricevis de fraŭlino leteron kaj ĝojegas!" Jes mi tre ĝojegis.
Vi opinias, ke ŝi skribis al mi pri tiuj noktoj, kiujn mi pasigis kun ŝi, pri tutkora amo, pri mia baldaŭa reveno hejmen?! — Ne.
Tie ne estis tiuj fabelaj noktoj. Eble ŝi eĉ ne ekpensis skribi pri tio. Kio estis skribita tie? Dum la tempo de l'ricevo eble mi ne povus diri.
Post kelkaj jaroj mi vidis ĝin sur mia tablo kaj trarigardis. Tie estis la samaj bonaj vortoj: "En la urbo estas kviete... Ni aŭdas bru-egon de la pafilegoj... Okazas, ke estas tre gaje... Estu sana... Mortigu ĉiujn malamikojn..."

“Mem revenu” — ŝi ne skribis.

Tia estis la gratulo de la fraŭlino restinta hejme. Baldaŭan revenon ŝi ne atendas. Ŝi deziras, ke mi baldaŭ finigu ĉiujn kontraŭrevoluciulojn.

Dum pasinta tempo sono de pafiloj terurigis la knabinojn. Sed nun ili ne timas eĉ terurajn sonojn de la pafilegoj.

* * *

Ruslando silentiĝas. Fajreroj de la fortega batalo de la granda revolucio daŭras. La fraŭlinoj aniĝas al unuiĝoj de la junaj komunistoj.

La fraŭlinoj ekstaras en la vicon inter la batalantoj por la komunismo. La fraŭlinoj adiaŭas la malnovan vivon.

— Adiaŭ! — ili diras.

Unu diras: “Ekkonsciante, ekkonsciante — decas malbeni la malnovan vivon kaj la mondon de la premeguloj”.

Ĉu bone! Ĉu malbeni la malnovan vivon! Ĉu bona la batalo por la nova vivo!

* * *

Se vi deziras scii, ili estas tre multaj, la malbenantaj la malnovan vivon kaj penantaj konstrui novan feliĉan vivon per sia laboro, ili estas — kaj vi renkontos tre multajn ilin.

Kelkiuj diras al ili, ke:

— Tiu vojo estas malfacila.

— Ne estu malsaĝuloj, la junularo nenion povas fari, ktp., ĉar tute egale vi estos venkitaj.

— Via ideo ne efektiviĝos, vi falos, — diras oni.

— Kaj vi reiros la malnovan vojon, — diras oni.

Tiujn vortojn mi mem aŭdis kaj unu fraŭlino diris al mi, ke oni diradis tiujn vortojn al ŝi. Sed ŝi ilin ne aŭskultis kaj iris, ŝi iras la vojon de la klasbatalo.

La malnovvojanoj subiĝis; la fraŭlino iras kune kun ni kaj reen ne reiras. Hurra! — ŝi ne reiros!

Ili ne reiros.

Ili ne subkapiĝas al la malnova mondo.

Ili ne estas simplaj knabinoj.

Ili estas infanoj de la klasbatalo.

* * *

Kelkiuj ne koleriĝu, ke mi skribis pri vi. Kelkiuj ne moku min, ke mi ne laŭdis vin.

Je komenco de mia rakonto mi diris, ke mi pri vi ne skribos. Skribadoj de la homoj pri la fraŭlinoj de la malnova vivo ruĝigas mian mienon.

Mi deziras neniun laŭdi. La opiniantojn kaj kriegantojn, ke “mi estas libera”, mi tiujn ne laŭdas. Kaj la larĝabrustajn belulinojn mi ne laŭdas.


Mi estas batalanto.

Mi laŭdas la batalon.

La junajn klasbatalantinojn mi laŭdas.

El tata lingvo tradukis *Faik Baĥteiev* (Astraĥanj).

Printempo en la poezio laborista



*Du konataj reprezentantoj de la moderna rusa poezio proletaria:
B. Kazin kaj G. Sannikov*

LABORISTA MAJO BAZILO KAZIN

*Mi frapas, frapas per martel'
La tubon sur stanget' el fero —
Kaj tondro sonas al orel'
En ĉiu dom' kaj en l' aero.*

*Per fertondilo tranĉas mi
Folion de la lad' malmola
Kaj kaptas fortranĉita stri'
L' alian en falaj' tavolo.*

*Kaj en la kort' kun sama gaj'
Post frosto estas riparado:
Marĉetojn tiom faris Maj' —
Tranĉaĵojn bluajn de zinklado!*

*Tra tubo gutoj de l' degel'
Frapetas laŭte per marteloj
Kaj tril' sonoras sur panel',
Sur la siteloj kaj bareloj!*

PRINTEMPAĴO GREGORO SANNIKOV

*Printempo. Blovas venta fluo,
Kriadas la frugilegar'.
Ho, kiel en sonora bruo
Vespere lacas teksistar'!..*

*Mi ankaŭ lacas dum laboro,
Mi devas hejmen iri jen...
Kaj kun sekreta mi angoro
La stablon lasas ĝis maten'.*

*Mi iras, sur degela vojo
Kantetas akv' en paŝa tremp'.
Mi rememoras kun malĝojo
Teksistan kanton de printemp'.*

*Rigardon tiras malproksimoj,
Ĝi trinkas bluon de l' ĉiel'.
Kaj sur lazur' vesper' sen limoj
Rozaĵojn teksas el la hel'.*

El rusa lingvo kun permeso de l' aŭtoroj tradukis N. NEKRASOV

LA RUĜA SANGO DE LA FLANDROJ

PIERRE BROODCOORENS

La presata teksto estas fragmento el la samtitola romano de fama belgia verkisto Pierre Broodcoorens. La romano estas verkita en 1913 kaj baldaŭ aperos ĝia esperanta traduko, plenumita de k.do L. Bergiers, samurbano de l'aŭtoro.

P. Broodcoorens ne estas multe konata ekster sia lando¹⁾. Por montri la direkton de lia penso kaj liajn verkten-dencojn ni citu unu lian verkon "Boule Carcasse", kiu aperis en la gazeto "Le peuple" en 1919. Ĝi temas pri la eniro kaj restado de la germanaj armeoj en Belgio.

Tiu verko ĝis nun ne estas eldonita. Nek la germanaj, nek la francaj, nek la belgaj eldonistoj volas eldoni ĝin, ĉar ĝi diras la *veron*. En tiu verko P. Broodcoorens parolas kontraŭ la milito eĉ pli forte ol H. Barbusse en "Le feu" (La fajro). Ni esperas baldaŭ aperigi fragmenton el tiu romano en nia revuo.

Tia sistemo de prisilento kaj bojkotado de la flanko de burĝa gazetaro al verkistoj, kiuj tuŝas sociajn ulcerojn de kapitalista ordo tro kurage, estas bone konata kaj ofte eksperimentata en nia "civiliza kaj humana" epoko. Sufiĉas memori la golgotan vojon al leganto de konata usona verkisto Upton Sinclair.

En tiu klasbatalo la burĝaro ne ignoras eĉ plej malmoralan taktikon. Nia fragmento donas ekzemplon de tia agmaniero, same kiel supre citita romano "Boule Carcasse". Komparante la esperantan tradukon kun germana traduko de la libro (de Johannes Schaft) k.do Barthelmess konstatis, ke en XIIa ĉapitro estas en germana eldono forigita la alineo: "Justeco bazita sur la homa rajto..." ĝis sekvanta alineo, evidente por estingi la proletarian karakteron de la verko. La verkisto nenion sciis pri tio. Do oni permesis al si aliigi tekston sen sciigi aŭtoron. Tia literatura etiko regis en Germanio dum milito. K.do P. Broodcoorens eksciinte dank' al Esperanto pri tiu edifa fakto petis nin atentigi pri ĝi S.A.T.-anojn-legantojn de ĉi-suba fragmento.

Necesas rimarki por plia kompreneblo de l'fragmento, ke Hilla (aŭ Hilla Citters) estas la ĉefrolulino de la romano, Aryn Klip — la rolulo. Audenhofe St. Gery — estas vilaĝo en Flandrio.

XII.

Kiel ĉe milionoj da vivantaĵoj, ofte pli kleraj kaj bonedukitaj ol ŝi, la elementaj ideoj pri la malbono ne ekzistis por Hilla, krom la serio de agoj kiujn ŝi konsideris maljustaj, nur ĉar ili estas puneblaj per la inferpuno en la alia vivo kaj per la juĝopuno — surtere. Apenaŭ ŝi kapablis legi la riton de sia meslibro kaj skribaĉi sian nomon, ŝi de post la dekunua jaro

1) Ni indikas kelkajn el liaj ĉefaj verkaĵoj: "Le roi aveugle" (La blinda reĝo) teatraĵo; eld. V. Larcier, Bruxelles, 1908. "Histoires merveilleuses" (Mirindaj rakontoj), eld. "Collection Junior", Bruxelles, 1914. "Le Coin des tisserands" (La kvartalo de la teksistoj), eld. "Cahiers independants", Bruxelles, 1919. "Le Carillonneur des esprits" (La sonorilmuzikistoj de la spiritoj), poemoj, eld. "Expansion Belge", Bruxelles, 1921. "La parabole du figuier sterile" (La alegorio de la senfrukta figarbo), romano, eld. "Exp. Belge", Bruxelles, 1921.

estis devigita zorgi pri aferoj pli aktualaj ol la punoj de la Infero kaj de la homa justeco. Ŝia katalogo pri pekoj kaj punindaĵoj estis tre elementa. El tio rezultis, kompreneble, en ŝia menso nesufiĉa kono pri la Bono aŭ la Malbono laŭ la Socio.

La medio, kie ŝi estis edukita kaj kie ŝi estis vivinta ĝis tiam, ne lasis en ŝi tiun postsignon neforgeseblan kaj utilan, kiun lasas ekzemploj de sinoferemo, amo kaj interhelpo.

Kaj ĝuste tiuj ekzemploj klarvidigas la animon, atentigas ĝin kontraŭ ĝiaj senvoliĝoj kaj estas la sola fundamento de kontrakto akceptebla de ĉiuj.

Justeco bazita sur la homa rajto, kaj ne sur la ŝtata rajto, la justeco kiu asignus al ĉiu ĝian parton de la utila laboro kaj la ĝuon de la kom-pleta frukto de ĝia laboro; moralaro de universala solidareco tia, kian postulas nia komprenpovo de la sociaj rilatoj — jen kio sole povus ĉesigi la timigan dekadencegon kies bildon vidigas la socio de post kiam, en la senhomaj temploj, la burĝaro anstataŭigis la ekstermitajn diaĵojn per siaj maldelikataj oraj idoloj.

La religiaj instruoj evidente havas neniun povon kontraŭ malbono kiun ili nur bedaŭregas, promesante ĝian kompenson en mondo kies ekzisto estas necerta, kaj kiu ĉiuokaze nur povus esti la eternigita reproduktaĵo de la tera Infero.

Hilla, sciante ĉion pri la klopodoj kaj ĉagrenoj de Aryn Klip, komprenis, ekzemple, ke la ŝtelĉasado estas nepermesita kaj danĝera ago. Same la mortigo, la ŝtelo kun armiloj. Tamen la mortiginto pri kiu oni ne trovis nedisputeblajn kulpopruvojn, ĉu li estas mallaŭdinda?

Ĉu oni povas lin kulpigi pri krimigo kiu ne estas sendiskute pruvita?

Ĉiu oni devas lin bojkoti? Tio ja estus ago pentinda. En tiu regiono de la alta Flandrio, tute kiel en Korsiko vivis pluraj krimuloj, kiujn la ĝendarmoj neniam maltrankviligis. Ĉiu sciis ke ili estis la farintoj de tiu aŭ alia banditaĵo. La konjektaĵoj abundis. Sed neniu kuraĝis atesti kontraŭ ili kaj ili ĉinikece ĝuis renomon, kiun ili tiris el la ĝenerala timo. La plej tipa kazo estis tiu de ŝtelĉasisto kiu, meztage, en Audenhove Gery, inter aro da fojnistoj, mortigis viron, per pafo el tute proksime, kaj kiu poste foriris malrapide, la armilon sur la ŝultro.

La kateĥismaj lecionoj estis glititaj de sur la cerbo de Hilla kiel fluanta akvo sur la rokaĵo. Ŝi iris dimanĉe al la meso, ĉar ĉiuj kampuloj faras tion, krom du aŭ tri judoj kaj dudeko da sentaŭguloj kiujn malestime oni montras, kiam oni ne bategas ilin, je la eknoktiĝo ĉe herbeja angulo. Kvankam ŝi aŭskultis la misiajn monaĥojn indigne paroli sur la katedro kontraŭ la balaj plezuroj kaj la malĝojaj malbonmoroj kiuj estas la sekvoj de ili, tio tamen tute ne malhelpis ŝin respondi per ardaĵoj rigardoj al la instigoj de la fraŭloj, maldiligente sin apogintaj kontraŭ la navaj kolonoj. Nek ŝi estis pro tio dancinta malpli mazurkon, aŭ skotdancon. La pleja gravaĵo estis konservi la bonaspekton, plenumi rigore la komunuzajn pi-ajojn.

Kiom da perfidaĵoj, vere abomenindaj agoj, kvankam ne konsiderataj kiel malbonaj, oni permesas nur por resti en la rango, vivi la vivon konforman al la grandega plimulto de la homoj.

Kaj kion signifas kelkaj miloj da gravaj malobeoj por kies puno la juro havas sian juĝejon, sian malliberejon, sian grandan armeon da juĝistoj kaj ĝendarmoj kompare kun milionoj da senpunaj krimoj, efektividataj ĉiutage en publikaj institucioj, en hejmoj, en doloraj laborejoj, kie ne nur viro sed ankaŭ virino kaj malgranda infano sendefendaj estas tirane premegataj kaj abomeninde ekspluatataj? Kiel do Hilla Citters povus kompreni tion, kio estas la malbono, kiam nek leĝistoj, nek moralistoj, nek diversaj eklezioj konsentas pri ĝia difino.

Kaj neniu volas ĝin vidi en la vivo mem, en tiu kruelega batalo por Pano, Mono kaj Gloro.

Tradukis *Léon Bergiers*.

NOVA UTOPIO

(ELĈERPITAĴOJ EL WELLS)

MARK STARR

“Homoj similaj al dioj“, la lasta verko de *H. G. Wells*, prezentas modernan Utopion — pli riĉan kaj belan ol tiuj elpensitaj de *Plato* kaj *More*. Ĝi estas ankaŭ senkompata satiro kontraŭ ĉefuloj en antaŭa brita politika mondo — speciale pri *Winston Churchill* kaj nobelo *Balfour*. Bedaŭrinde, kvankam en sia verko *Wells* atakis marksismon kaj “ĝian evangelion de malamo“, li nenie montras kiel ni atingos la Utopion. Vere en malbona senco li estas Utopiano pri transiro al facila interkompreno kaj la dezirata stato homa.

Mi ne penos pridiri la novan mondon kreitan de la imagpovo de *Wells*, sed nur donos elĉerpitajn fragmentojn.

1. Pensolingvo. Pensoj ne bezonas sonojn kaj vortojn en tiu ĉi Utopio. *Urthred*, Utopiano, klarigas:

“Antaŭ longaj epokoj ni certe kutimis uzi lingvojn. Sonojn ni eligis kaj sonojn ni aŭdis. Homoj pensis, poste elektis vortojn por esprimi pensojn, aranĝis kaj parolis ilin. La aŭskultanto aŭdis, rimarkis kaj retradukis la sonojn en ideojn. Pli poste iumaniere homoj komencis ricevi kaj kompreni la ideojn antaŭ ol ili vestiĝis per vortoj kaj esprimiĝis per sonoj. Aŭskultantoj aŭdis per la menso tuj post kiam la paroladisto ekhavis siajn ideojn kaj antaŭ ol li vestigis ilin per vortoj eĉ en sia propra menso. Ili sciis jam kion li volis diri, antaŭ ol li estis dirinta tion. Tiu senpera penskomunikado fariĝis ordinara; evidentiĝis ke per malmulta peno preskaŭ ĉiuj homoj povis interkompreni tiamaniere. Poste oni sisteme disvolvis tiun ĉi metodon kaj nun ĝi estas ĉiam uzata. Ni pensas senpere unu al la alia. Ni decidis sendi la penson al alia kaj ĝi tuj komuniĝas se la interdistanco ne estas tro granda. Ni uzas sonojn nur por poezio kaj plezuro, por emocioplenaj momentoj, por krei al homoj tro malproksimaj aŭ al

bestoj. Sed ni ne uzas ilin por la transdono de ideoj de kaj al homaj mensoj. Kiam ni pensas al vi, la penso, tiom kiom ĝi trovas similajn ideojn en via cerbo, tuj reflektiĝas per taŭgaj vortoj en via menso. Kompreneble vi vestas ĝin en viaj propraj vortoj kaj frazoj, kaj ŝajnas al vi, ke ni parolas en via lingvo."

2. Regoformo. Alia Utopiano diras:

"Utopio havas nek parlamenton, nek politikon, nek privatan posedajon, nek konkurencon, nek policon, nek karcerojn, nek frenezulejon, nek kripulojn, nek invalidojn.

Politiko, komerco kaj konkurenco estas metodoj por adaptiĝi en kruda primitiva socio.

Utopio ĉesis uzi tiujn metodojn jam de post pli ol 1000 jaroj.

Plenaĝaj utopianoj ne bezonas regadon ĉar ili trairas tiun evolufazon en infanaĝo.

Nia edukado estas nia regado.

Red. postnoto. La rimarko de k.do *Mark Starr*, ke *Wells* "nenie montras kiel ni atingos la Utopion" ne ŝajnas esti plene prava, ĉar *Wells* tamen provis respondi al demando "kiel", kion oni povas vidi laŭ jena fragmento:

"La ŝanĝo de la ordo en Utopio okazis ne per subita revolucio. Forestis neatendita ŝanĝo de leĝoj, moroj aŭ metodoj de ekonomia kunlaborado. La bazprincipoj de la nova ordo aperis ĝis kaj dum La Lasta Epoko de Kaoso. Antaŭdifinitan planon neniu havis ...

... La komenco estis farita per diskutadoj, libroj kaj psikologiaj laborejoj.

Iom post iom la socion penetris la penso ke eduklaboro ne povas doni ĝustajn rezultojn en la mondo, kie regas la klaso de nerespondecaj riĉuloj. Tiu klaso estis forigenda unuavice por la bono de la tuta raso.

... Jes ili luktis furioze sed sensukcese. La lukto por tutmonda sciencia organizo de l' ŝtato daŭris preskaŭ 5 jarcentojn. Ĝi ĉefe estis kondukata en la regiono de ideoj, al kiuj la reganta klaso respondis per persekutado, kruelo, insinuado kaj bojkoto. Sed la venko videble transiradis al la flanko de atakantaj organizantoj de socia edukado. La precizan daton oni ne povas difini. Sed venis tempo, kiam Utopio komprenis ke la nova ordo estas establita en ĝi ..."

Do evidentas, ke *Wells* en la citata romano antaŭvidas kaj klare priskribas "pacan revolucion" eble eĉ pli ĝuste diri — "evolucio", se konsideri ke ĝi daŭris dum 5 jarcentoj.

Nature ĉi-rimarko tute ne celas forigi la skeptikan rilaton al la proponata de *Wells* "paca poreduka metodo", sed nur pliprecizigi la noton de k.do *M. Starr*.

Red.



Patri-ideo en la nuna rusa poezio¹⁾

N. NEKRASOV

1)

"... ni, grandrusaj laboristoj, plenaj de nacifiera sento, ni volas neprege liberan kaj sendependan, memstaran, demokratian, respublikan, fieran Grandrusion²⁾, konstruantan siajn rilatojn al la najbaroj laŭ la homeca principo de l'egaleco, sed ne laŭ la senhonoriganta grandan nacion servuteca principo de la privilegioj. Ĝuste ĉar ni volas ĝin, ni diras: oni ne devas en la XX jarcento... "defendi la patrion" aliel ol batalante per ĉiuj revoluciaj rimedoj kontraŭ monarkio, terposedantoj kaj kapitalistoj de PROPRA patrio, t. e. kontraŭ la PLEJ MALBONAJ malamikoj de nia patrio: — ne devas la grandrusoj "defendi la patrion" aliel ol dezirante malvenkon... 3)"

N. LENIN. "Pri nacia fiero de la grandrusoj" (1914).

1. Kiom da vervo, kiom da patoso ĉiam incitis la patri-ideo en ĉiuj nacioj de la mondo dum la tuta daŭro de la homara historio! Kiom da sango ĝi fluigis sur la tero, estante plej ofte sola kaŭzo kaj almenaŭ universala preteksto por enlogo de la masoj al ĉiu nova militbuĉado inter popoloj!

Kreante ŝtatojn, imperiojn, regnojn, ĝi instigis intensan konstruadon de valorajoj, ĝi naskis la sociajn problemojn, ĝi estis grava puŝilo de progreso. Kaj samtempe, atingante certan gradon de sia disvolviĝo kaj dismovante la kadrojn de sia influo, ĝi ĉiam estis fariĝanta malfeliĉaĵo por la homaro, perfortante la malpli fortajn, sed ja samesencajn kaj same obstinajn nacifenomenojn, kaj detruante per fajro kaj fero la antaŭajn sukcesojn de la kulturo.

Ĝi naskis ŝovinismon, ĝi naskis tiranion, imperiismon, jugon kaj estis kaŭzo de la terura interhoma malamo.

Se ni supozu, ke la homoj estu havintaj nur unu nacion, — t. e. ke la homoj ne havu diverslingvecon kaj ĉiam parolu nur unulingve, — estas tute nature kompreni, ke la mondhistorio estus pasinta tute alivoje kaj jam de la komenco mem kreigus civito tuthomara. Nature estus okazantaj konfliktoj kaj eble grandaj bataloj — tamen jam ne naciecaj, sed nur sociaj. Kaj tiuj ĉi bataloj sendube jam antaŭlonge venigus al starigo de certa justa progresiva vivbazo, ĉar ilin ne estus komplikiganta la malbeninda nacieca kaoso.

Kiel ajn ni revu, tamen la realaj cirkonstancoj daŭras premi kaj restas ege fortaj eĉ en la nuna epoko de la venanta mondrevolucio. Kaj eĉ en la lando, kie la internaciismo ektriumfis, en Rusio, la ideo de patrio elmontras sian potencon. Feliĉe, ni povas konstati, ke specialaj trajtoj de la rusa nacia karaktero helpis, ke tiu ideo — esence nacieca — venkis sin mem elinterne, mortigis sin mem definitive — por reviviĝi kiel entuziasma aspiro al kosmopolita tutmondiĝo — al la internaciismo.

1) Aperigante tiun ĉi artikolon, mi petas konsideri la faritajn komentojn kaj konkludojn kiel senpere rezultigitaj el la materialo studita. Mian personan opinion mi dume konservas neeldirita. Cetere mi esperas, ke la temo nun prezentita igos aliajn kamaradojn plej serioze ekzameni tiun ĉi interesan problemon por fari eventualan traktadon laŭ alia vidpunkto kaj eble ankaŭ laŭ aliaj popoloj. Mi atentigas, ke mi esploris ĉi tie nur ĉefe psiko-ideologian lankon, kaj preskaŭ ne tuŝis aliajn elementojn de la nacieco: teritorio, raso, moraro ktp.

2) Oni kutime nomis ĉiujn rusianojn ĝenerale — rusoj, la rusojn mem — grandrusoj (velikorusoj), la ukrainojn — malgrandrusoj (malorusoj) kaj la blankrutenojn — blankrusoj (belarusoj). Do la vorto Grandrusio ne estas samsenca kun Granda Rusio, sed rilatas nur al la etnografia pure rusa lando.

3) Necesas tamen formuligante la proletarian vidpunkton al la patrio bone atenti, ke tiuj ĉi linioj estis skribitaj en agita artikolo en la mem komenco de la milito 1914, kiam la ideoj de la "malvenkanoj" devis penetri plej naciemajn, ŝovinistajn kaj imperiismajn cirkonstancojn

Nature, tio ne estu komprenata en absoluta senco, ĉar tiu esence stranga transformiĝo okazas (ne jam okazis) iel paradokse. La evoluo ĉiam pasas per vojo de kontrastoj.

Plej videble la evoluprocedo de l'ideoj estas observebla pere de la poezio — eterna respogulilo de la mensa kaj emocia mondo. Do ni turnu niajn okulojn ĝuste al tiu sfero.

2. Mallongan skizon pri la homara historio kaj pri fatala sorto de la grandaj potencaj historiaj mondŝtatoj, naskiĝintaj kiel rezulto de la disvolviĝinta nacia patrio, donas al ni versaĵo "Ex oriente lux" de fama rusa filozofo-teologo Vladimir Solovjov (1853—1900), konata per siaj artikoloj, en kiuj li pledis libercon de la konfesioj kaj antinacionalismon. Li pentras bildon de la antikva Persa regno, potenca kaj granda, atencanta la tutan tiam konatan mondon meti sub la tiranion de l'Oriento, — kiel maksimumon de la patria idealo, — kaj katastrofe falanta disbatite de malgranda aro da bravaj patriotoj de la malgranda antikva Grekio:

"El Oriento lum' kaj briloj!" —
Kaj por regadi en prepar'
Irana reĝ' al Termopiloj
Brutaron pelis da sklavar'.

Sed ja la lumon Prometeo
Ne vane donis al Helad':
Da civitanoj etarmeo
L' amasojn pelas al fugad' *).

La Oriento fiaskis. Iom post iom ĝiajn tendencojn reprovas la Okcidento.

Kaj ĝis Hindio kaj ĝis Gango
Glorvojon havis kiu hom' ? —

La Macedona trupfalango,
La aglo de l'triumfa Rom'.

Jam ne per forto de arbitra tiranio, sed:

Per fort' de l'juro kaj racio
Vastiĝis Roma suveren' —

La Okcidenta Imperio
La mondon unuigis jen.

La hegemonio super la tuta mondo preskaŭ tute realiĝis.

Do kion oni plu deziris
Kaj al la sang' revenis jam ?

— L'animo de la mond' sopiris
Pri la spirit' de l' kred' kaj am'.

La Okcidento fiaskis ankaŭ, ĉar la absolutan monarkion de la Persia Oriento ĝi anstataŭis nur per formalismaj civilaj leĝoj, ne cementitaj de konfido kaj ĉefe de komunhomara idealo. La Okcidento ne donis al la mondo spiritan — moralan unuecon. Ĉiam plu la homaro interbatalas, kaj la okuloj, senesperigitaj de l'Okcidento, ree sin turnas al la profetita savmisio de l'Oriento:

Ne falsas la profetparolo:
Ekbrilis lum' el Orient'
Kaj, kio estis nur simbolo,
Anoncis tion en prezent'.
Kaj, disverŝante heltorenton
Kun forta vol' en plena sum',

Kun Oriento Okcidenton
Interpacigis tiu lum'.
Rusi'! En tiu antaŭsento
Ĉi-penso venas kun insist': —
Vi estu kia Oriento —
Ĉu tiu ĉi de Kserks' aŭ Krist'?

Jen tie ĉi ni devas halti por fiksi tiun ĉi fundamentan problemon, kiel elirpunkton por nia tuta esploro, ĉar ĝuste en tiu ĉi problememo starigita de Vladimir Solovjov kuŝas ĉiuj radikoj, el kiuj elkreskis kaj floras la moderna rusia patriideo en la epoko de la tutmonda socia revolucio.

La stranga historia sorto de Rusio ĝuste estas en tio, ke la idealo de l'*antinaciisto* Vl. Solovjov preskaŭ tute koincidis kun la aspiroj de la rusaj naciistoj (pli ĝuste: panslavistoj) Ĥomjakov, Tjutĉev, Aksakov k. a., kiuj aliflanke akre batalis kontraŭ la "okcidentemuloj", kia estis ekzemple la konata verkisto I. S. Turgenev.

*) Ĉiuj versoj en tiu ĉi artikolo estas esperantigitaj de mi mem.

Vere, oni povas eĉ pli profunde vidi la radikojn de tiu tendenco, jam en la tempoj de la granda duko Johano III (en XV. jarcento) kun lia ideo pri Moskvo kiel *tria Romo*, post kiam Romo mem perfidis aliĝinte al la katolikismo, kiam la kristana Bizantia Konstantinopolo (Cargrad-Cezarurbo) fariĝis, musulmana, turka, kaj kiam Moskvo restis sola centro de l'ortodoksa eklezio. t. e. la sola rifuĝejo de *vero*. De tie ĉi ankaŭ devenas la ideo de *carismo* (cezarismo) kiel heredaĵo de la Bizantia mondimperio.

Tamen tiaj esploroj de l'afero estus tro malproksimaj por nia temo limigita ekskluzive de la nuna tempo.

Ĉiel ajn, la XIX. jarcento estis florepoko de l'esperoj pri mesia rolo de Rusia Oriento rilate al la morala (religia) savo den¹⁾ la tuta mondo. Kaj kvankam la rusia imperiismo jam larĝe estis etendanta siajn brakojn, direktatajn de la kapitalistaj interesoj al Dardaneloj, al Centra-Azio kaj al Ekstrema Oriento, multaj tute sinceraj rusaj intelektuloj espereme rigardis al la potenca rusa monarko kaj volonte estis atribuantaj al li siajn proprajn moralistajn idealojn.

La versaĵo de Vl. Solovjov, demandanta: kian tamen lumon portos Rusio al la mondo, ĉu lumon de Kserksa azia despotio aŭ la lumon de Krista interhoma amo — estis eble unua tralumiĝo de tre serioza dubo.

3. Baldaŭ ĉiuj iluzioj de la panslavistoj kaj "orientemuloj" estis tute forventolitaj. La malluma regado de Nikolao II kaj precipe la revolucio 1905, kiam estis peze subpremita la popola ribelo, lasis jam neniujn dubojn pri tio, ke la monarkia Rusio tendencas esti ĝuste Oriento de Kserkso.

Poeto-simbolisto Aleksandro Blok, unu el tiuj, kiujn oni pleje povas nomi poetoj de Rusio, profunde esprimas tiun senesperigon pri sia patrio en ciklo da versoj dediĉitaj al ĝi. Adresante sin al la patrio, li diras (en 1907):

Deiris vi, kaj mi min ŝovas
Al varma sablo en dezert',
Fieran nomon plu ne povas
La lang' eldiri kun la cert'.
Ne bedaŭrante, en obo,
Vin mi komprenas en ekzist':

Ho jes. Vi estas Galileo
Por mi — nerevivinta Krist'.
Kaj nun karesu vin aliu.
Sovaĝfamigu por repun':
La Homa Fil' en lok' neniu
La kapon povas meti nun.

Per tiu ĉi versaĵo Blok esprimis ĉiujn siajn ĉagrenojn pri la lando, kiun li konsideris kiel la evangelia Galileo, la lando de Kristo, kiu — ve! — ne reviviĝis.

Saman senesperecon eldiras ankaŭ alia ĉefpoeto al la skolo de la simbolistoj — Andreo Bely — per versaĵo dediĉita al Z. N. Gippius. Li jam vidas neniun celon, neniun homare valoran utilon por ke Rusio ekzistu plu:

Sufiĉe: jam plu ne esperu, —
Pereu, ho mia popol'!
Forfalu, en spac' malaperu
La jaroj sub peza tavolo!
Jarmil' da mizer, senvoleco!
Permesu, patrio — patrin',
Al via malplena vasteco
Ploreĝi, klinite sur vin:
Ti-kie sur ĝiba deklivo
Amaso da verda kverkar'
Sin levas al plumba masivo
Da vila ondanta nubar', —

Ti-kie sur kamp' en silento
Vagadas fantomsiluet'
Kaj fajfas, svingante en vento
Per sia osteca skelet', —
Ti-kie al mi tra nebuloj
Rigardas el nigra noktmez'
La flavaj kruelaj okuloj
De via drinkeja frenez', —
Ti-kien da mortoj, suferoj
Trapasis sulkaj-orocesi'. —
Pereu, en spac' malaperu,
Rusio, ho mia Rusi'!

Regis malluma nokto, kiun ankoraŭ pli densigis la alruliĝinta ondego de la mondmilito 1914 kaj definitive aĉigis la ŝovinismaj kaj germanofobaj "poezoj" de Igor-Severjanin, galanta poeto de aristokrat-salonoj kaj de la triviala burĝeca degenerado.

(Daŭrigota).

¹⁾ akuzativ-genitivo, proponita de k.do Miĥalski.

Homlingvo, Esperanto kaj ilia evoluo

(MARKSISMA VIDPUNKTO)

1)

M. KRJUKOV

Marksismo estas tendenco de moderna scienco klarigi tutan socian fenomenaron per bezonoj kaj postuloj de ekonomia, materia vivo de homo. Formulo, koncize esprimanta esencon de marksismo, estas jena: *"estado difinas la konscion, ne male"*. Ĝi signifas — realo, medio kreas la konscion, sed ne male. Ĉi tendenco penetras tutan modernan sciencan. En biologio ĝi estas darvinismo, kiu diras: *"estado, medio de vivaĵoj difinas formon kaj vivmanieron de la lastaj, ne male"*. En fiziko ĉi tendenco klarigis per Ejnŝtejn en relativprincipo, kiu diras: *"objektoj, formoj difinas la spacon, ne male — ĉar senobjekta absoluta spaco estas neperceptebla malrealajo"*. Sed kio estas objektoj, medioj kaj estado? Ĝi estas ĉiama realo senĉese ŝanĝiganta. Kaj ĉi ŝanĝiĝo trenas post si niajn komprenon kaj konscion, kiuj paralele kaj same ŝanĝiĝas. Tial la vero ne povas esti absoluta ĉar ĝi malestas ekster materio kaj traktas nur ŝanĝojn de la lasta, ĝi povas trakti nur rilatojn de objektoj kaj nenion plu. Kaj kiel la ŝanĝoj la vero povas esti eterna (sed ne absoluta).

Lingvo evidente estas fenomeno de socio ĉar ekster socio ĝi ne havas la sencon. Lingvo servas sociajn bezonojn de homo. Sed ĉar la bezonoj ŝanĝiĝas, same ŝanĝiĝas la lingvo. Ĉi ŝanĝoj rilatas al vivo de socio. Do ili devas esti klarigataj per lumo de marksismo. Sed por bone trakti ĉiujn prilingvajn demandojn, antaŭ ĉio ni devas bone kompreni — kio estas la lingvo ĝenerale kaj kion ĝi servas. De unua rigardo estas rimarkeble, ke lingvo estas preskaŭ nura rimedo por esprimi ideologion de socio. Vere estas, ke la ideologio montriĝas krom tio en sentoj kaj konduto de homo. Sed plej oportuna rimedo por esprimi ĉi sentojn kaj konduton estas nur lingvo, kiu per la fakto mem fariĝas nepra kaj nura respegulo de ideologio socia. Kaj la respegulo unua frapas rigardon de nesperta esploristo kaj ŝirmas de li alian pli gravan ĉiutagan rolon de lingvo, kiu priservas sociajn bezonojn same, kiel multaj aliaj iloj. *Ĉi dua rolo de lingvo estas tiu de plej ordinara teknikilo*. Lingvo naskiĝis kun socio kaj kreskas kaj firmiĝas kun ĝi. Homsocio eĉ la plej primitiva ne estas ebla sen lingvo same kiel ĝi ne estas ebla sen aliaj teknikiloj, kiujn oni prave rigardas nur kiel daŭrigojn de manoj. Se homo ne havus la manojn en formo de bone aplikebla laborilo, la homo neniam atingus nunan gradon de kulturo. La manoj aliformigas iom post iom ekonomian vivon kaj interrilatojn de homo. Kaj la lastaj jam kreas respondan ideologion kaj aliformigas la homon mem. Lingvo de homo estas manoj de ĝia menso, kiu zorgas niajn ekonomiajn bezonojn. Ĉi manoj estas same bone faritaj kiel manoj de korpo kaj rilate al menso ili faras saman servon kiel la lastaj faras rilate al kruda materio de homa medio. La manoj de menso gvidas kaj prilaboras la manojn de korpo. Kaj kiel sen manoj de korpo oni ne povas fari ĉiujn produktojn por korpo, tiel sen manoj de menso oni ne povas fari produkton de menso — la penson kaj per la penso la menson mem. Ja estas science konata fakto, ke sen vorto (aŭ sen ĝia kovrita formo) ne estas ebla la penso (Helmholz, Bogdanov, Ŝtejntal). *Vorto naskas, kreas la penson, ne male*. Ĝi estas formulo de lingvoscienco, bazita sur la plej modernaj konoj prilingvaj. Vorto estas naskata el ĉiutagaj bezonoj de vivo. Do la lingvo estas produkto de vivo kaj ne povas veni desupre, ekstere, kiel ne venas en la vivon ĉiuj aliaj teknikiloj. Sed multaj nespertuloj komprenas la lingvon nur kiel respegulon de ideologio. Ni devas bone noti, ke lingvo estas 1) respegulo de ideologio kaj 2) ĝi estas plej

ordinara teknikilo de homsocio. Kaj estas tute nature, kiam multaj, vidante nur la unuan signifon de lingvo, opinias ĝin netuŝebla. Ili erare opinias, ke lingvo ne povas esti racie farata, ke ĝiaj ŝanĝoj tute ne povas dependi de homa volo, kiel ŝanĝoj de ideologio aŭ idearo. La bone konata hipotezo juĝanta lingvon kiel organismo, vivanta per si mem, ekster volo de homo, — estas sekvo de ĉi miskompreno. Ĉi hipotezo tute similas al hipotezo pri homsocio, juĝata same kiel sendependa organismo, funkciata de ia eksterhoma forto. Nature — konkludoj faritaj el ĉi hipotezoj neveraj estas same malveraj. Do ni bone notu la du signifojn de homlingvo por ne vagi en fantazio kaj ne trafi utopion, kiam ni ekesploros vojojn de plua disvolviĝo de lingvo.

Estas science konstatita fakto, ke ĉiuj lingvoj senĉese ŝanĝiĝas. Ruslingvo de Petro la Granda ¹⁾ tre diferencas de lingvo de nunaj bolŝevikoj. Kaj la lasta rimarkeble diferencas eĉ de lingvo de Puŝkin kaj Karamzin ²⁾, kiuj verkis nur antaŭ kelkaj jardekoj. Kaj preskaŭ same staras la afero en ĉiuj aliaj nacilingvoj. Kial? Ni bone scias, ke la tempo de Petro, de Puŝkin kaj nuna tempo de bolŝevikoj kun iliaj futuristoj estas la tempoj de ega intensigo kaj plivigliĝo de ekonomia vivo en Rusio. Kune kun ĉi tempoj venis grandaj ŝanĝoj en ekonomia stato. Kaj ĉi ŝanĝoj igis volon de samtempoj ŝanĝi sian lingvon por fari ĝin konforma al plivigliĝinta nova vivo. La volo kaj bontrovo de lingvoreformistoj (Petro, Puŝkin, Karamzin, Majakovski) evidente estas naskataj kaj gvidataj de bezonoj de nova ekonomistato. *Do la ŝanĝoj de lingvo devas plene respondi al tiuj de l' ekonomio.* Rusa revolucio liveras plej bonan pruvon de ĉi tezo. La revolucio dekretis novan simpligitan ortografion de ruslingvo (estis forigitaj el rusa alfabeto kvin superfluaj literoj kaj multaj senbezonaĵoj gramatikaj reguloj). Kaj ĉiuj kontraŭuloj de revolucio samtempe fariĝis kontraŭuloj de nova ortografio. Registaroj de Denikin, Judeniĉ, Kolĉak, Semenov kaj aliaj ĉiam oficialis nur malnovan ortografion kaj multnombraj rusaj elmigrintoj ĝis nun same malemas al la nova. Iliaj ĵurnaloj kaj libroj estas presataj en malnova ortografio (kompreneble ekster Rusio).

Malsameco de lingvoj venas de tio, ke interesoj de diversaj grupoj de l' homaro ne estas dece ligitaj kaj tute aŭ preskaŭ tute ne postulis interkomunikiĝon (ekster milito). Ju pli mastrumado proksimas al tiel nomata natureca, t. e. ju pli ĝi estas primitiva kaj kontentigas sian bezonon per propraj produktoj sen interŝanĝo de varoj, des pli multaj estas lingvoj. Ju pli diversaj grupoj estas ekonomie apartigitaj, des pli diferencas iliaj lingvoj. Italio ĝis nun havas ĉirkaŭ 30 diversajn lingvonuancojn. Kiam malestas kaŭzoj por kunigi kaj komunigi apartajn lingvojn, tiam ĉiu el ili evoluas en sia propra maniero same kiel ajna ilo en apartigitaj gentoj. Simpla bastono de prahomo en Aŭstralio evoluis en bumerangon, kaj en antikva Romo la sama bastono evoluis en ĵetstangon de militista maŝino. En Eŭropo la sama pragento lingvo (Sanskrito — parolita supozeble en okcidenta Rusio, Latvio) en diversaj gentoj evoluis en diversajn lingvojn, kiam la gentoj ekonomie apartiĝis. El la pragento komuna Sanskrito tiel venis nunaj tre diferencaj lingvoj angla, franca, germana, rusa kaj hindoeŭropaj. Kaj male, kiam komuniĝas ekonomia vivo de diversaj gentoj kaj nacioj, tiam same komuniĝas, unuiĝas iliaj lingvoj. En antikva Rusio ekzistis multaj gentoj (drevlanoj, polanoj, kriviĉoj kaj multaj aliaj) parolintaj diferencajn dialektojn kaj nun kiam ekonomia vivo en tuta vasto de Rusio komuniĝis, la dialektoj unuiĝas en tute responda grado kaj diverseco de dialektoj tendencas malaperi plene.

1) Komenco de 18 jarcento.

2) Komenco de 19 jarcento.

Ŝanĝoj de lingvo respondas al ŝanĝoj de ekonomistato de homsocio. Ni scias, ke ekonomiaj ŝanĝoj kreskas kaj ariĝas iom post iom. Kaj dum ili kreskas, ili estas kvazaŭ bastardoj de reganta sociordo, kiu ne amas kaj eĉ persekutas ilin. Sed jen ili maturiĝis kaj premataj de malnovo ili indigne ekribelas. Ĝi estas revolucio, kiu laŭleĝigas ilin kaj eĉ faras mastroj de nova sociordo. Do — same okazas kun la lingvo, kiu toleras ŝanĝojn paralelajn kun tiuj en ekonomistato. *Kaj ju pli grandaj estas la lastaj, des pli grandaj ŝanĝoj okazas en lingvo.* Ĉi tezo klarigas ĉiaman ligan inter revolucioj en socio kaj reformoj en lingvo. En Germanio — militoj de kamparanoj (kompreneble la praekonomiaj) kaj prilingvaj reformoj de Luter. En Ĉeĥio ŝanĝoj en socio — kaj prilingvaj reformoj de Hus. En Rusio — reformoj de Petro la Granda kaj liaj prilingvaj reformoj, malapero de servutrajto — kaj prilingvaj reformoj de Puŝkin, malapero de carismo — kaj nova ortografio, proletaria revolucio — kaj nuna lingvo de bolŝevikoj kun iliaj futuristoj. *Neniam prilingvaj reformoj venas ekster revolucio.*

Kio okazas nun en homsocio? Post granda franca revolucio ekgigis kapitalismo, kiu ligis ĉiujn popolojn de terglobo per reciprokaj ŝanĝoj de varoj, per ekonomiaj ligoj. Kaj aperis respondaj ŝanĝoj en diversaj lingvoj. En tute malsamaj lingvoj abunde aperis tiel nomataj internaciaj vortoj tute aŭ preskaŭ tute identaj. *Sed la interligoj ekonomiaj tiel rapide ekmarŝis, ke ŝanĝoj en lingvoj (malrapidaj kaj spontanaj laŭ sia naturo) ne povas atingi ilin¹⁾.*

Kaj jen por helpi spontanecon aperas racio. La homoj komencas pensi pri rimedoj komunigi la lingvon. La bezonoj de vivo pli kaj pli internaciiganta igas ilin pripensi la komunigon. Kaj nur la plej-sentemaj homoj ekkomencis la aferon. Antaŭ la franca revolucio pri lingvo komuna okupis sin nur tiaj intelektuloj kiel Dekart kaj Leibnic kaj nun la ideo okupas jam ĉirkaŭ 2.000.000 da homoj el ĉiuj landoj de terglobo. *La homsocio emas raciigi kaj la ŝanĝoj okazas en la lingvo — ĝi racuĝas.* Dum unu sola jarcento aperis pli ol 200 da diversaj projektoj de lingvo internacia. Kaj ĝi estas senduba montrilo de venontaj ŝanĝoj en homsocio reorganizota en tuthomara skalo.

(Daŭrigota.)



PERSPEKTIVOJ DE RADIOTEKNIKO

PROF. A. A. PETROVSKI

(Fino)

Observadoj de la ĉiela stato, de meteorologiaj elementoj, de elektra kaj magneta kampo ankaŭ progresadis plensukcese, kaj la rubandoj de la registrigaj aŭtomatoj rapide pleniĝis je valoraj enskriboj. Proksimiĝis la lasta laborvespero, kiam subite neatendita cirkonstanco preskaŭ ne pereigis ilian atendaĵon. Ricevante laŭ kontrolo de ĥronometro la meteorologian

¹⁾ Kapitalismo ekgigis mondon ne pli ol dum unu jarcento, sed lingvoj nature kaj sentrade ŝanĝiĝas nur dum multaj jarcentoj kaj eĉ jarmiloj! Kaj socialismo estos multe pli ega komunigilo.

bultenon⁷⁾, ĉiutage sendaton de la *Eiffel'a* turo post taga horsignalo, la radioinĝeniero rimarkis antaŭtage, ke laŭ ĉiuj simptomoj apud Islando formiĝis minimumo de aerpremo; dum la pasinta tagnokto ĝi plene disvolviĝis kaj, translokiĝante kun rapideco de ĉirkaŭ 80 klm. hore, rapide moviĝis norden. Jam sentiĝis lukto de naturfortoj kontraŭ homa arto, kaj la stajoj, ĉirkaŭvolvantaj la maston, fajfebruis pro streĉiĝo dum fortaj ventegblovoj. Oni rapidis kolekti la aparatojn kaj pretigi ilin por ŝarĝigo; oni faris en nerva animstato la lastajn observojn, kiam subita ventpuŝego forŝiris la tegmenton de la tendo, farinte dume nur malgrandan ruinigon. Tamen estis necese rapidi, — oni sin turnis al la lasta rimedo: katodlampoj prenitaj en la ĉenon, — la instalaĵo ordigita por foriro, — kelke da premoj sur la ŝlosilon, — kaj la radioreto, forŝirita de nova ventegblovo ĵetiĝis en la spacon, forportante kun si la lastan elektromagnetan ondon, petantan pri helpo⁸⁾). La kontrolstacio, sin trovanta ĉe la *Baffin'* a golfo, pro la ekskluziva malfavora vetero jam delonge observis la ekspedicion, — kaj la signalo estis tuj rimarkita. Post kelke da horoj la ventego komencis kvietiĝi; la aeroplano, senprokraste sciigita pri la malfeliĉo, reaperis en la nuboj kaj, singarde malsupreniĝinte, akceptis la frostiĝintajn observistojn, kiuj per siaj propraj korpoj protektadis kaj savis la aparatojn kaj la kolektitajn de ili materialojn.

Malfacila nokto, pasigita sentegmente meze de tempesto kaj mallumo, timo pri sia sorto kaj ankoraŭ plie pri la kolektitaj materialoj — ne povis resti sen sekvoj. La astronomo malvarmumiĝis; la ekspedicia kuracisto konstatis ĉe li pliakutiĝon de reŭmatismo kaj neŭralgiajn dolorojn en la tuta korpo. Pro grava sanstato de la malsanulo estis necese restarigi lian malboniĝintan ŝtofinterŝanĝon. Ĉar la aeroplano bezonis ne malpli ol dek horojn por atingi sian destinlokon, la kuracisto ne volis preni sur sin solan la respondecon pri konfidita al li vivo kaj decidis sin turni al konsulto. Post du minutoj li interrilatiĝis kun la radiostacio en *Bergen* (Norvegio) kaj petis, ke oni lin komunikigu telefone kun la kabineto de konata specialisto-terapeŭto en *Kristiania*. Post malmultvorta priskribo de malsansimptomoj, mikrofonmembrano, metita sur la bruston de la paciento, transdonis al la anteno la malfortajn sonojn, devenantajn el lia koro. Helpe de multobla fortigilo tiuj ĉi sonoj direktiĝis pluen laŭlonge de la telefondrato tiom klare kaj forte, kvazaŭ la profesoro aŭskultus la malsanulon en sia kabineto. La timo montriĝis troigita: la koro kaj pulmoj estis en ordo, — kaj oni denove malkunigis la radiointerligon.

Ĉar la profesoro konsilis por resanigi la pacieron apliki elektrizadon laŭ *d'Arçonval* helpe de kondensigelektrodoj, la kuracisto sentis sin tre

7) La meteorologia bulteno, sendata de la *Eiffel'a* turo, komunikas la aerpremon, direkton kaj forton de vento kaj staton de la maro en ses punktoj: *Reikiavik* (Islando), *Valentia* (Irlando), *Qeussant* (Francio), *La Coroña* (Hispanio), *Horta* (Acoraj Insuloj) kaj *Saint-Pierre-et-Miquelon* (Ameriko). Analogajn bultenojn sendas ankaŭ multaj aliaj radiostacioj.

8) La unua apliko de radiotelegrafo en okazo de avario havis lokon la 23-an de jan. 1909: la atlantikbordaj radiostacioj de Usono ricevis signalon, ke angla ŝipo "Republik" kun 461 pasaĝeroj pereas en mezo de maro pro densa nebulego. El la tero estis neeble doni savrimedojn; sed la samaj telegramoj estis ricevitaĵoj de kelkaj ŝipoj, kaj unu el ili, "Florida", sukcesis savi ĉiujn pasaĝerojn kaj la maristaron de "Republik", kiu baldaŭ subakviĝis.

embarasita. La aeroplano ne posedis plenan instalon por fizikaj kuracmetodoj. Tamen la radioinĝeniero rapide trovis eliron: li eliminis la antenon, kaj la liberiĝintajn konduktorfinojn, donantajn neestingiĝantan fluon de alta frekvento, li kunigis, unuflanke, kun la lita metalreto kaj, duaflanke, kun la korpo de la paciento; izoliga kuseneto⁹⁾ servis kiel intermedio, apartiganta la ambaŭ improvizitajn elektrodojn. Post kelke da minutoj agrabla varmo, estiĝanta ie interne en la profundo de la organismo, disfluis tra la korpo de la malsanulo, kaj liaj fortoj ekis iom post iom restariĝi. Por kvietigi la nervojn, la kuracisto konsilis okupi la cerbon de la paciento per io facila kaj agrabla. Estis la kvara posttagmeze; la aeroplano atingis la kontinenton de Ameriko; en eŭropa Anglio estis jam vespero, kaj en koncertejoj mankis lokoj por la granda kvanto da dezirantoj ĝui muzikon. Tamen loko ne estis eĉ bezona. Grandioza entrepreno — "Muziktrusto" —, celanta propagandi la plej belajn verkojn de mondfamaj komponistoj, posedis sur la skotlanda bordo sian propran radiostacion je kelkmiloj da ĉevalpovoj kaj 20.000 metra ondo. Kun la radiostacio estis kunigitaj kelke da plej imponaj koncertejoj de Brito. Antaŭ koncerto en iu ajn el ili, mikrofono, lokita apud la estrado, estis enigata en la kablono de la radiostacio, kaj ĉiu havanta abonaparaton en la limoj de 4.000—5.000 klm. povis ĝui hejme plej belan muzikon. La aeroplano, preskaŭ seninterrompe faranta malproksimajn flugadojn, posedis tian aparaton, — do oni translokigis la liton de la astronomo en la muzikakajuton, kaj ĉarma simfonio baldaŭ igis lin forgesi ĉiujn malbonaĵojn de la pasinta nokto.

Sed la radioinĝeniero, tiutage multe laborinta, ankaŭ sentis sin malfortigita kaj duondorme kuŝis, lulata de harmonioplena kombinaĵo de muziksonoj. Tamen lia cerbo adis labori, kaj la ekscitita imago pentris antaŭ li sinsekvajn bildojn de estonta progreso de lia specialeco. Jen antaŭ li aperas eta elektromotoro, granda kiel akvomelono, moviganta tutan laborejon. Kial ĝi estas tiom malgranda? — aŭdiĝas demando, en kiu la inĝeniero tuj rekonas la voĉon de sia propra dubo. Cetere, ni ja scias, ke paralele kun altiĝanta frekvento la dimensioj de mekanismoj tre malgrandiĝas: ordinara malgranda transformatoro, laboranta per 50-perioda ŝanĝiluo, pezas ĉirkaŭ 50 klg., kaj same forta aparato, sed destinita por 500-perioda fluo¹⁰⁾, pezas ne pli ol 5 klg.; la avantaĝo de alta frekvento konsistas ja en la ebleco koncentrigi energion en malgranda amplekso kaj pezo.

Sed — kio ĝi estas? La laborejo kreskas, plilarĝiĝas, la stabloj ien malproksimiĝas, disfluante en nebulo, — kaj antaŭ li aperas vasta kampo, dense kovrita de cerealoj. Iuj stangoj estas laŭplane dislokitaj sur la tuta areo, kaj violnuanca lumradiado, kvazaŭ aŭreolo, ĉirkaŭas la dentformajn pintojn de tiu siaspeca instalaĵo. Sub liaj rigardoj la trunketoj kovriĝas de spikoj, aperas floroj, kaj dikaj grajnoj ŝutiĝas teren, falante pro sia propra pezo. La radioinĝeniero rememoras viditajn de li iam eksperimentojn de

9) Tiamaniera d' Arçonval-izado, laŭ jam ekzistantaj spertoj, donas bonajn rezultojn (*Ernst Remak*, Grundriss der Elektrodiagnostik kaj Elektrotherapie, 1909, p. p. 182 kaj 185).

10) La uzata en tekniko ŝanĝfluo ŝanĝas sian direkton 100-foje en sekundo; en radiotekniko oni uzas kiel intermita ĉenero fluon, kies direkto ŝanĝiĝas 1000—2000 fojojn en unu sekundo. Propre radioteknikaj fluoj ŝanĝas la direkton ne malpli ol 20000 kaj ĝis 2000000 fojojn en unu sekundo.

elektrokulturo¹¹⁾ kaj ĉi momente rimarkas, ke malgranda radioinstalaĵo provizas la tutan kampon je altfrekventa fluo, kvazaŭ senĉese surverŝante ĝin per elektromagnetaj ondoj, dispersiĝantaj laŭ ĉiuj direktoj... Lacedo klinadis la inĝenieron je dormo, sed neforpeleblaj pensoj pri estontaj perspektivoj de radiotekniko ne donis al li ripozon. Kial — li meditis, — ni ne povas distance translacii la energion sen kabloj? Vere, ordinara radioreto dispersas ĝin egalmezure laŭ ĉiuj direktoj; sed, kombinante kelke da antenoj, oni povas ja eĉ nun koncentrigi la tutan translacion en zono, kies longo nur 20-oble superas la larĝon!... Do, antaŭ lia imago desegniĝis en la spaco hidraŭlika instalaĵo, kiu helpe de komplika anteno ĵetas kvazaŭ elektromagnetan torenton larĝan nur je unu kilometro. Kaptita post cento da kilometroj per dua grupo da antenoj, la torento estas translaciata pluen kaj tiamaniere atingas sian destinlokon kun perdo de nur 50% da energio. Cetere, tiuj ĉi 50% ne tute perdiĝis por la homaro; sufiĉe granda parto de la energio estis sorbita dumvoje kaj faris miraklojn sur la kampoj, lokitaj laŭlonge de la translacilinio.

Nu, se sukcesos energitranslacio, tiam oni povos pripensi interplanedajn interrilatojn. Nur se ne ekzistus la tediga respegultavolo, kiu malhelpas al la ondo penetri pli alten, ol 200 kilometroj!.. Cetere, ni rigardu: eble en ĝi ekzistas "fenestroj"; se — ne, ekstremokaze oni povos supreniĝi tra ĝiaj limoj. Certe, la aeroplano devos tie moviĝi kun rapideco de kelkmiloj da klm. hore, por kontraŭefiki la pezoforton, ĉar la barometra premo de la hidrogeno, el kiu konsistas tiu tavolo, certe ne superas du—tri milonojn de milimetro. Jen, se kemiistoj sukcesos ekstrakti el iu ajn malofta mineralminaĵo geokoronion, kies denseco, videble, estas plurfoje malpli granda, ol tiu de hidrogeno, tiam, kombininte aeroplanon kun aerostato, fariĝos facile supreniĝi al tre granda alteco. Ĉiaokaze ĝi estas nura demando de ĝenerala teknika progreso. Tamen mi opinias, ke prefere ol atendi geokoronion, estas pli simple konstrui gasopetreblian balonon kaj laŭgrade de supreniĝo malplenigi ĝin per pumpilo, prikalkulante, ke ĝi ĉiam laboru per kunpremo kaj samtempe kompensu la necesan parton de pezo de la tuta aparato... Kontentigita pri la elpensita kombinaĵo, la radioinĝeniero profunde endormiĝis.

Dume la aeroplano flugis suden. De tempo al tempo ĝi forsendadis siajn signalojn, kaj paro da kontrolstacioj rapide prenis la pelengojn, tuj notante ĝian situacion sur du-azimuta karto¹²⁾. Samtempe la trovitaj koordinatoj estis transdonataj radiotelegrafe kaj perceptataj de ĉiuj interesiĝantoj pri la ekspedicio. Cetere, la aeroplano ne plu bezonis komunikaĵojn: antaŭ la piloto pendis detala karto de Norda Ameriko, sur kiu la kutimaj flugvojoj estis dense notitaj per malgrandaj rondetoj, aŭtomate eklumantaj, kiam la aeroplano flugis super koncerna loko. Tio fariĝis, ĉar dum la tuta tempo de flugado funkciis reto da malfortaj radiostacioj, distribuitaj laŭlonge de la vojlinio; ĉiu stacio havis sian instalaĵon kaj funkciigis sole la lampon, kiu respondis al ĝi sur la radiokarto.

11) Ozonigo de la aero, fariĝanta dum funkciado de forsenda radiostacio, videble, efikas favore al vegetaloj. Efektive, en proksimeco de radiostacioj la kreskajaro ĝenerale estas bona.

12) Karto, desegnita tiamaniere, ke ĉiuj direktoj de du donitaj punktoj A kaj B al iu ajn punkto C formas kun la linio AB samajn angulojn, kiujn formas sur sfero la grandaj rondoj, desegnitaj trans A kaj C kaj trans B kaj C, kun la granda rondo, desegnita trans A kaj B (Wincent Pletts, "Wireless World", 1919, majo, pĝ. pĝ. 68-73).

La malsana astronomo jam tute resaniĝis. Li kutime ne ofte vizitadis la muzikkajuton, sed sub influo de sia nerva stato kaj de fariĝinta kvietiĝo li eksentis emon al muziko. Ellitiĝinte li ekis pririgardi la ejon kaj je la unua fojo priatentis strangan objekton, supozeble, laŭ kelkaj signoj, destinitan por estigi sonojn, sed malmulte similan je iu ajn el komune konataj muzikiloj. Proksimiĝinte al ĝi la astronomo rimarkis elektran eliminilon kaj, turninte ĝin pro scivolemo, estis miregigita, kiam la nekonata instrumento aŭdigis sonon, laŭ sia nuanco similan je violonĉelo. Instinkte movante la manojn apud la nekomprenebla instrumento, li ne kredis sin mem: la aparato sekvis liajn movojn, kaj flua "glissando" kun ĉiuj intermitaj de ĥromatika gamo akompanis ĉiun translokadon de liaj fingroj. Lia senlima mirego estis kontentigita sole, post kiam la radioinĝeniero, vekiginta ĉe la unuaj sonoj de la bone konata de li aparato, klarigis ĝian konstruon kaj funkciadon.

Ĝi estis radioinstrumento — muzikilo de la estonto. Ĝi entenas du malgrandajn radioinstalaĵojn, kiuj produktas neestingiĝantajn vibradojn helpe de katodlampoj. La instalaĵoj estas agorditaj tiamaniere, ke la produktataj osciloj havas periodnombrojn proksimajn unu al alia sed ne tute egalajn. En tiu konkreta kazo la nombroj estis: 1 miliono da osciloj je sekundo — kaj 1 miliono kaj 500 osciloj je sekundo. Se la oscilnombroj estas tute egalaj, la osciloj, sumiĝante en komuna kondukto, simple pli aŭ malplifortigas nin la alian, depende de tio, ĉu ili supermetiĝas en konsenta aŭ en kontraŭa direkto¹³⁾; sed, ĉar ili diferencas je periodnombro, do estas evidente, ke koincidinte en unu momento, post unu miliono de sekundo ili disiĝos precize je duonperiodo, sekve, supermetiĝos renkonte unu al alia. Tiakaŭze la suma oscilfluo, havinta en la unua momento grandan forton, post unu miliono de sekundo malaltiĝas ĝis nulo; tiaj pli kaj malplifortiĝoj de la sama fluo okazos ankaŭ plue laŭ sama ordo, — do ni havas periodan fortoŝanĝon de la fluo, pulsadon, ripetiĝantan milfoje dum sekundo. Se ni trapasigos la tiel ricevitajn flujon tra konvena aparato en telefonon, ties membrano nepre eligos sonon, kies alteco korespondas al la supre menciita oscilnombro, t. e. proksimume al la noto "do" de la tristreka oktavo¹⁴⁾. La instalaĵo estas tiagrade sentema, ke agordoŝanĝo sekvigas ŝanĝon de nombro de pulsoj kaj, sekve, de alteco de la produktata sono. Plej malgranda pozoŝanĝo de la mano de la eksperimentisto en certa zono proksime al la instrumento jam sufiĉas por ŝanĝi la altecon; translokigante la manon en vastaj limoj, oni povas havi diapazonon de kelke da oktavo. Certe, ludo sur tia muzikilo postulas tre rafinitan aŭdosenton kaj certan teknikon, — tamen ĝia invento kune kun ĉio cetera evidentiĝas, kiom multformaj kaj originalaj estas la aplikoj, kiujn povas doni al la homaro la progresoj de radiotekniko.

Elrusigis D-ro *Andreo Fišer*, L. K. — Tiŝlis.

13) Oscilojn de granda frekvento la orelo ne aŭdas, ĉar ĝi perceptas oscilojn en la limoj de 16 ĝis 40000 je sekundo.

14) La nombro da osciloj je sekundo por la noto "si" de dustreka oktavo egalas 960. La noto "do" havas 1024.

ELDONAĴOJ DE S. A. T.

Aĉeteblaj ĉe Administracio: R. Lerchner, Colmstrasse 1, III. r.
Leipzig-Stötteritz (Germanio) — Poŝtĉeka konto n.o 6835

	fr. svis.	Mk. g. or.
Goethe-Faŭsto I trad. Barthelmess broŝ.	1,80	0,80
Eklumo en Abismo trad. Else . . . broŝ.	1,50	0,60
. blind.	2,80	1,10
Tri verkoj de Tolstoj trad. J. M. . . .	0,70	0,35
Dokumentoj de Komunismo	1,80	0,80
Komunista Manifesto	0,50	0,25
For la neŭtralismon de Lanty (II ^a eld.)	0,30	0,15
A. B. C. de Sennaciismo. De V. Elsudo	0,75	0,35
Sigelmarkoj po folio (20 p.)		0,40
Malnovaj n-roj de Sennacieca Re- vuo (propagandcele) po ekz.	0,10	0,05

LIVERKONDIĈOJ

La livero okazas **nur post antaŭa pago.** Oni pagu **nur per naciaj monbiletoj.** Poŝtmarkoj ne estas akceptataj.

RIMARKIGOJ PRI PREZOJ

Modifoj de la prezoj estas rezervataj.

La **unua** prezkolono montras la prezojn por bonvalutaj landoj en svlsaj frankoj. La **dua** por mez-kaj malbonvalutaj landoj en mk. germ. oraj: **1 dol. = 4,20 Mk. g. oraj,** pagebla laŭ la taga kurzo en pap. mono.

Por sendkostoj oni aldonu **20%** por registrita sendaĵo **25%** de la pagota sumo.

S.A.T.-anoj sciigantaj la membro-n.ron rajtas depreni **nur 1 ekz.** de ĉiu speco kun **20%** rab.

ESPERANTISTOJ

KLASKONSCIAJ
LABORISTOJ
ĈIULANDAJ

ENPROFUNDIGU EN LA TENDENCOJN KAJ

MEMBRIĜU

ĈE ORGANIZAĜO DE PROLETARIAJ
ESPERANTISTOJ

SENNACIECA ASOCIO
TUTMONDA

SIDEJO: PARIS

KAJ ABONU TIES

ORGANON

SENNACIECA REVUO

RED: PARIS. ADM: LEIPZIG

KUN

LITERATUR-SCIENCA ALDONO

RED: MOSKVO ADM: LEIPZIG

NEPREPOSEDU

ESPERANTAJN VERKOJN

ELDONITAJN DE

ELDONA-KOOPERATIVO

DÜSSELDORF-LEIPZIG

INFORMOJN PETU ĈE:

ADMINISTRACIO: R. LERCHNER

LEIPZIG-STÖTTERITZ

COLMSTRASSE 1, III (GERM.)